

BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

En la numero:

KIK '86 —
ALTNIVELA,
SUKCESA

•
TRAPE
INFORMADI

•
LA BULGARA
E-MOVADO


•
ELSTARA
ESPERANTISTO

•
„FOTO ESPE-
RANTO“

•
NI RECENZAS

•
JUNA
ESPERANTISTO

•
IDR '86



KIK '86 — altnivela, sukcesa



La partoprenantoj en KIK '86 dum lekcioj

Foto: Petko ARNAUDOV

Ni konstatas, ke de tago al tago la intereso al Esperanto pligrandiĝas. La homoj deziras scii ion pli ne nur pri la lingvo, sed pri la movado, pri ĝia unujarcenta historio, pri la originala kaj traduka Esperanta literaturo, pri la rilatoj de la Esperanto-movado kun aliaj internaciaj movadoj k.t.p. La problemoj kaj temoj estas ege vastaj kaj jam delonge nia movado sentas bezonon de kunlaborantoj, bone informitaj pri la diversaj aspektoj de la Lingvo Internacia. Tiuj ĉi kunlaborantoj devas esti kompetentaj ne nur respondi al komplikaj demandoj, sed ili devas scii kiel, en nia nuntempa mondo, pli efike kaj saĝe propagandi Esperanton.

Guste tiu ĉi bezono naskis la ideon pri Konstanta Internacia Kvalifikejo (KIK), kies celo estas doni teoriajn kaj praktikajn konojn al kunlaborantoj de la Esperantistaj asocioj en la socialismaj landoj.

Gi-jare, de la 1-a ĝis la 10-a de septembro, por kvara fojo KIK estis organizita en nia lando, pli ĝuste en la konvena por tiu ĉi celo Internacia Esperanto-Kursejo en vilaĝo Pisanica. Partoprenis dudek esperantistoj el Ĉeĥoslovakio, Hungario kaj Bulgario. Rektoro de KIK estis d-ro Árpád Máthé, vicprezidanto de Hungara Esperanto-Asocio kaj ĉefredaktoro de „Budapeŝta Informilo“.

Se oni devas pritaksi la laboron de la ĉi-jara KIK, necesas unue emfazi la bone elektitan kaj prilaboritan programon, kiu enhavis divers-tajn prelegojn: „Apliko de Esperanto en-

scienco kaj tekniko“, „UNESKO, UN kaj aliaj interŝtataj kaj neregistaraj organizaĵoj kaj UEA“, „La internacia ideologia strukturo de la samtempa Esperanto-movado (UEA, TEJO, MEM, SAT, NEM)“, „Specifaĵoj de la Esperanto-movado en socialismaj kondiĉoj“, „La rolo de Esperanto en la pachtalo“, „La rolo de Esperanto kiel internacia literaturperanto“ kaj aliaj. Prelegantoj estis d-ro Árpád Máthé, Vladimír Němec el Ĉeĥoslovakio, Nikola Aleksiev, Kunčo Válev, Dončo Hitrov, Jordan Angelov, Marin Bâcev kaj Georgi Mihalkov.

Dank' al la kompetenta gvidado de la rektoro, la programo estis precize plenumita. La altnivelaj prelegoj ne nur kaptis la atenton de la aŭskultantoj, sed provokis viglajn diskutojn kaj la ĉi-jara KIK iĝis vera scienca forumo.

Tamen pri la sukcesoj de KIK plej bone parolas la rezultoj. Ĉiuj partoprenantoj ekzameniĝis kaj ĝuste la rezultoj de la ekzameno montras la gravecon de KIK. La ekzamena komisiono kun prezidanto Dončo Hitrov, kiu pro la forveturo de d-ro Árpád Máthé transprenis la rektorecon de KIK, konstatis, ke la partoprenantoj bone kaj serioze preparis sin por la ekzameno. Preskaŭ ĉiuj prelegoj de la partoprenantoj estisigitaj kun gravaj problemoj de la Esperantomovado. Plej bone prezentis sin István Sztankó el Hungario, Václav Pospíšil kaj Pavel Polnický el Ĉeĥoslovakio, Stoil Nikolov kaj Vladimír Jelev el Bulgario.

Por plene karakterizi la ĉi-jaran KIK necesas menci, ke la varia kultura programo multe helpis por la pli bona interkonatigo de la partoprenantoj. La dek tagoj, pasigitaj en Pisanica, estis utilaj por ili ne nur tial, ke ili pliriĉigis siajn konojn pri la problemoj de la Esperantomovado. Ili havis ankaŭ la eblecon pri bone ekkoni la pitoreskan regionon, en kiu situas Pisanica —unu el la plej belaj lokoj en Bulgario. La partoprenantoj en KIK vizitis la restadejon Pamporovo, vilaĝon Mogilica, kie troviĝas la unika arkitektura muzeo Aĝuŝev Konak, la Historian Muzeon kaj la muzeon de la fama hungara poeto László Nagy en urbo Smoljan.

Dum la liberaj posttagmezaj horoj la partoprenantoj spektis diapozitivojn, diskutis pri la problemoj de la Esperantomovado, sed verŝajne plej neforgesebla restos la vespero, kiun ili pasigis ĉe la fajro. La forta fajro kvaŝaŭ simbolis ilian deziron pli bone kaj pli profunde ekkoni la problemojn de la movado, en kiu ili aktive partoprenas.

*)New — Neŭtrala Esperanto — Movada

Georgi ILIEV



TRAFFE INFORMADI PRI ESPERANTO!

En unu sola artikolo ne eblas trakti similan ege ampleksan kaj gravan por nia movado problemon tiom detale, kiom dezirate.

Longa estas la historio de informado pri la kreita de doktoro Zamenhof internacia lingvo Esperanto. Estis tempo, kiam ne ekzistis landaj aŭ aliaj organizaĵoj kaj kiam la informado dependis precipe de la iniciatemo de unuopuloj. Nur en 1956 en Frostavallen, Svedio, okazis kunveno de reprezentantoj de inform-fakoj de landaj E-asocioj. Ĝia celo estis traduti la problemojn de informado pri Esperanto. La rezulto estis formulita en la jam fame konata dokumento „Fundamenta principaro de informado pri la Internacia Lingvo“.

La lingvoj estas produktoj de la socio kaj ne de la naturo — ili formiĝas kaj evoluas en la homa kolektivo. Do ili subiĝas ne al biologiaj, sed al sociologiaj kaj lingvistikaj leĝoj. Kontraŭstarigo de la nocio „artefarita lingvo“ al „natura“ aŭ „vivanta“ lingvo ne estas celkonforma, ĉar tio povus krei la eraran impreson, ke Esperanto, diference de la vivantaj lingvoj, ne povas esprimi ĉiujn subtilaĵojn de la homa penso. Simila antaŭjuĝo ofte estas rezulto de la malperfekteco de nia informado.

Por atingi kiel eble plej bonajn rezultojn en la informado pri Esperanto kaj en la varbado de novaj adeptoj de la lingvo, oni devus bone posedi ĝin. La grado de lingvoposedo estas grandparte atesto pri la edukiteco kaj klereco de la aparta persono. Ju pli granda estas la vortprovizo kaj posedo de gramatikaj reguloj, des pli granda estas la persona reputacio, ĉar se oni ne majstras la lingvon, tute ne eblas argumenti eĉ por la plej justa afero! Se temas pri skriba informado, la koncerna teksto, por atingi sian celon, devas esti nepre bone redaktita.

Rezultoj de tro entuziasma informado pri Esperanto ofte estas negativa rilato al la lingvo.

Ankaŭ troa substrekado de la facileco de Esperanto povus malutili. Iuj esperantistoj prezentas la lingvon tiel, kvazaŭ ĝi povus solvi preskaŭ ĉiujn problemojn de la homaro en la nuntempa streĉa internacia politika situacio. Simila super-taksado de Esperanto kaj de ĝia rolo estas nereala kaj same kondukas al negativaj rezultoj. La informanto pri Esperanto devas havi vastan scion pri la temo.

Por altigi la kvaliton de nia informado, estas necese akcenti sur ĉio, kio atestas la kulturan kaj praktikan valoron de Esperanto. Ĝiaj atingoj estas ege grandaj, sed pri ili la vasta publiko (eĉ nun, post centjara ekzistado de la lingvo) certe ne multe scias. Do grava tasko de ĉiu esperantisto, de la informaj fakoj kaj komisionoj ĉe niaj E-societoj estas regule liveri objektivajn informojn pri la Esperanta originala kaj traduka literaturo, pri sciencaj verkoj, pri landaj kaj internaciaj E-kongresoj, belartaj konkursoj, festivaloj k. a., pri la atingoj en la sfero de instruado de Esperanto, ege ĝojigaj kaj kuraĝigaj precipe en Bulgario; oni nepre starigu kontaktojn kun la centra kaj loka gazetaro, kun radio- kaj televidstacioj kaj regule informadu ilin pri E-eventoj kaj atingoj! Ĉi-somere Radio Varna unuan fojon elsendadis por siaj eksterlandaj gastoj duonhoran programon ankaŭ en Esperanto! Tio estas rezulto de la pozitiva rilato de niaj plej altaj ŝtataj instancoj, kiuj alte taksas la rolon de Esperanto por interkompreniĝo kaj paca kunlaborado de la popoloj.

Jam komenciĝis la nova lernoĵaro. Ni esperu, ke la planoj por plibonigo de la instrulaboro dum la antaŭstaranta jubilea jaro 1987, ellaboritaj de CE de BEA kaj de la esperantistaj societaj en la tuta lando, nepre realigos.

Tre grava tasko de niaj informsekcioj estas vaste popularigi la disvastigon de Esperanto en ĉiuj medioj en nia lando. Ni devas interesiĝi

pri Esperanto diversajn sociajn organizaĵojn kaj precipe la amaskomunikilojn, regule havigante al ili taŭgajn materialojn.

Cefa celo de la informado kaj argumentado pri Esperanto devas esti: konvinki la vastan publikon, ke posedo de tiu lingvo prezentas gravan avantaĝon, garantias pluan intensiĝon de la

interhomaj rilatoj en la mondo; ke Esperanto sendube estas taŭga lingvo-ponto por interkompreniĝo kaj paca kunlaborado de homoj el ŝtatoj kun diversaj soci-politikaj ordoj, bone konsciantaj nian plej gravan devon: savi de la vivo sur la Terol

Donĉo HITROV

KIK-anoj pri KIK

Dum la lastaj tagoj de la ĉi-jara KIK nia kunlaboranto Dimităr Veselinov renkontiĝis kun iuj el la partoprenantoj en tiu grava aranĝo kaj starigis al ili kelkajn demandojn.

DEMANDOJ:

1. KIU VI ESTAS KAJ KIO VI ESTAS?
2. VIAJ IMPRESOJ PRI LA ĈI-JARA PROGRAMO?
3. VIA OPINIO PRI LA NIVelo DE LA PRELEGOJ?
4. ĈU VI ESTAS KONTENTA PRI VIA PARTOPRENO EN KIK?
5. ĈU VI HAVAS REKOMENDOJN RILATE LA ORGANIZADON DE KIK?

I. Ing. Vladimír Némec (Ĉeĥoslovakio):

1. Komputisto, vicprezidanto de Slovaka Esperanto-Asocio (SEA).

2. El organiza vidpunkto — bonege preparita.

3. La prelegoj de miaj kolegoj estis interesaj kaj mi povis pliriĉigi miajn konojn pri la E-movado, literaturo, ktp.

4. Jes, certel

5. Mi rekomendas, ke la organizantoj de KIK petu de la landaj asocioj liston de lektoroj kaj temoj, pri kiuj ili pretas prelegi. Tiel ili povus kompili ankoraŭ pli interesan prelegserion. Al la prelegoj estu aldonitaj koncizaj komentarioj.

II. Paszabí János (Hungario):

1. Organizanto ĉe HEA.

2. Tre riĉa kaj bone organizita

3. La prelegoj estis altnivelaj, kelkfoje bri-laj.

4. Ĉi-tie mi akiris multajn novajn sciojn.

5. Insisti pri la plua okazigo de KIK.

III. Pavel Polnický (Ĉeĥoslovakio):

1. Oficisto, prezidanto de loka grupo de ĈEA en Poděbrady, gvidanto de junpionira E-grupo en baza lernejo.

2. Mi estas tre kontenta pri la programo kaj restado ĉi tie, sed, bedaŭrinde, ne ĉiuj socialismaj landoj sendis siajn reprezentantojn.

3. La prelegoj estas altnivelaj kaj diversemaj, utilaj por ĉiuj partoprenantoj.

4. Jes, mi eksciis multajn interesajn faktojn, mi trovis novajn amikojn kaj tio estos certe utila por mia plua laboro en la E-movado.

5. Jes, tre mankis al mi ebleco kanti kaj praktiki sporton. Sajnas al mi, ke en tiel granda kursejo oni devus ebligi ankaŭ aktivan ripozon.

IV. Stefano Sztanko (Hungario):

1. Eksa komputisto (jam pensiulo). En la E-movado mi partoprenas ekde 1957. Jam 9 jarojn mi estas prezidanto de Fejer-departamenta Komitato de HEA kaj de 1958 — delegito de UEA.

2. Ĝi estas sufiĉe ampleksa. Laŭ mi: la prelego estas interesa, se ĝi donas novajn informojn. Tiaj informoj ne tre abundis.

3. Plej granda parto de la prelegoj estis konvenaj, kelkaj el ili eĉ ege bonaj.

4. Mi ĝojas, ke mi povis partopreni, ĉar mi akiris novajn amikajn kontaktojn kun movadaj aktivuloj kaj novajn spertojn.

5. Generale mi estas kontenta pri la organiza laboro, sed mi povus fari kelkajn rekomendojn:

a. la preparperiodo komenciĝu per pridiskuto kaj akcepto de la temoj;

b. la prelegantoj antaŭe sciu, pri kio parolas la aliaj lektoroj, por ke en la prelegoj ne estu ripetado;

c. KIK estu supera, internacia kvalifikejo por gvidantoj de E-organizaĵoj en socialismaj landoj. Do ne necesas konigi al la partoprenantoj kiu estis Zamenhof, kiel ekestis Esperanto, k. s.;

ĉ. en la programo estu kiel eble pli da praktikaj temoj, pli da sperto;

d. kelkajn vortojn pri la kursejo mem: bela konstruaĵo, belega ĉirkaŭaĵo, tre bonaj kondiĉoj por instrui, lerni, propagandi, sed . . . necesas pli da zorgoj por purigado de la ĉirkaŭaĵo de la kursejo. Eble libervola E-brigado povus helpi?

STARTO DE NIA MOVADO

1879

Esperanto jubileas. Tiu-
okaze ni (la hungaraj redak-
toroj — noto de „BE“) **transdonas al la legantoj**
tiun ĉi neordinaran artikolo-
n pri la unuaj paŝoj de
nia movado kun la rimarko,
ke la aŭtoraj konkludoj es-
tas diskuteblaj.

La iama ekzisto de la Volapuka
movado estas pli-malpli konata al
la esperantistaro kiel menciinda
interesaĵo. Sed la reganta (inter-
lingvistika percepto de la inter-
lingva problemo rezultigis, ke la
bildo formiĝinta pri tiu movado
estas esence falsa. Abundas faktoj
de la movado por la Internacia
Lingvo — mallonge: interlingva
movado — fare de la lingvistiko
ne studeblaj, sekve kompreneble ne
studitaj.

La movado interlingva startis
en majo de 1879, per apero de la
lingvoprojekto Volapuka. Tiu
Volapuk-movado elformiĝis en la
komenco de la 80-aj jaroj kaj ĝi
konsistis el la adeptoj de la men-
ciita lingvoprojekto. En la fino
de la 80-aj jaroj aperis la ĝemelo de
tiu movado, kiu konsistis el la
adeptoj de alia lingvoprojekto, Es-
peranto. Ĝi startis 1887. 07. 26.
Ni esploru la identecon, diverse-
cojn kaj rilatojn de tiuj du fenome-
noj.

LA ROLO de la du movadoj en
1887 estis la sama: kreo kaj disvas-
tigo de la Lingvo Internacia. Ambaŭ
movadoj taksis la aŭtoron de
la koncerna lingvoprojekto kreado
de la lingvo. El la aŭtoroj **Schle-
yer**¹⁾ ne, **Zamenhof**²⁾ klare vidis, ke
kreinto de lingvo ne povas esti
individuo, nur komunumo; do:
la movado mem. Ambaŭ personoj
estis nur iniciatoroj.

La movadoj tiel kreis sian ling-
von, eĉ se nur kelkaj personoj kon-
sciis tiun kreon rolon. Volapuko
naskiĝis malvive pro la malopor-
tuno de la lingvoprojekto. La
lingvo Esperanto sukcesis estiĝi
pro la eminentaj kvalitoj de la
lingvoprojekto.

LA FIASKO de la Volapuka
lingvoprojekto kaŭzis la ekdisfa-
lon de ĝia movado ekde la jaro
1889, fine ĝian sensignifiĝon en la
komenco de nia jarcento. Sed tiu

fiasko diskreditis ankaŭ la reale-
con de la celo: krei la Internacian
Lingvon. Ĝi do malfavore influis
ankaŭ la Esperanto-movadon, ĝu-
ste en sia komenca, estiĝa periodo.
En la 90-aj jaroj ambaŭ movadoj
nur vegetis. Nur la Esperanto-mo-
vado postvivis la krizon, kaj en
la komenco de la jarcento disvasti-
ĝis rimarkinde. Meĵloŝtono en
ĝia historio estas la lingvonormi-
go en 1905. La **Fundamento de Es-
peranto** estas la naskiĝatestilo de
la Internacia Lingvo.

LA ORGANIZAJ STRUKTUROJ
baziĝis sur la lokaj kluboj, kiujn
kunligis la landaj asocioj. Tre
gravan internacian rolon havis la
centra organo **Volapükabled le Ze-
nodik**. Same kiel aliflanke la Es-
perantisto kaj poste la **Lingvo In-
ternacia**. Oni organizis internaciajn
kongresojn (kompreneble en aŭ-
gusto. . .). Por plenumi la ling-
vistikajn taskojn oni starigis aka-
demiojn: **Kadem Volapüka kaj Aka-
demio de Esperanto**.

Ambaŭ klopodis traduki la kla-
sikulojn de la belliteraturo. Ambaŭ
celis la praktikon, precipe la tra-
fikon, komeron, ktp. Oni taksis
plej gravaj atingoj la lingvoin-
struadon en kelkaj lernejoj.

KULT(IK)AJ TRAJTOJ karak-
terizis ambaŭ movadojn. Krom la
majstro-kulto kaj himno ekzistis
ankaŭ Volapukaj insignoj, kravat-
pingloj, broĉoj, kruĉoj, ĉampanoj,
likvoroj, cigaroj, lampoj, ĉapeloj,
krajonoj ktp. Kaj la volapukistoj
same ĝojis pri tiuj bagateloj, kiel
la esperantistoj pri la siaj.

PACIFISMAJ IDEALoj en-
radikiĝis en ambaŭ movadoj. Ekz.
la „**Interna ideo**“, kiu estas konata
kiel tute speciala esperantaĵo, fakte
estiĝis kiel volapukaĵo. Ĉi tie
ni mencias nur du epizodojn.

(Cetere la **Schleyer-an** citaĵon
enhavas la fama artikolo de Leop-
old Einstein: **Zur Geschichte der
weltsprachlichen Versuche von Leib-
niz bis auf die Gegenwart**³⁾. Zamen-
hof mem tradukis tiun artikolo-
n kaj metis ĝin en sian **Funda-
menta Krestomatio de la lingvo
Esperanto**, 1903. Sed la privola-
pukan parton de la artikolo li simpl-
le elprenis, kaj ne publikigis.

La persona kontinueco parte
klarigas al ni la similecon kaj la
multajn koincidojn de la du mova-
doj. La en 1885 fondita Nuren-
berga Mondlingvo-Asocio (**Welt-
spracheverein in Nürnberg**) en
1888 ŝanĝis sian lingvon Volapu-
kan al Esperanto, kaj, de 1889
eldonis la unuan E-revuon. An-
kaŭ la Volapukista Grupo en Veliko
Tárnovo esperantiĝis jam en 1888,
kaj de 1891 eldonis la revuon **Lum-
o**. Abundas elstaraj movaduloj
ŝanĝintaj la lingvon: Antonio **Grab-
owski** (1877), majstro de la E-tra-
dukarto, Nikola **Zlatev**, (1888),
fondinto de la Volapukista Klubo
en Veliko Tárnovo, Leopold **Ein-
stein** (1888), plej fervora propagan-
disto de Volapuko, poste de Espe-
ranto en Germanio, Christian
Schmidt (1888), prezidanto de la
Nurenberga Mondlingvo-Asocio,
Vladimir **Szmurlo** (1888), eldonis-
to de la unua esperantista jarlibro
kaj de la revuo **Riga Stelo**, Emil **Lud-
wig Meier** (1889), fondinto de la
Bavaria Volapukmovado, Daniele
Marignoni (1889), verkinto de la
unua E-lernolibro por italoj, Va-
ilij Nikolaevič **Devjatnin** (1891)
E-poeto, Joan **Tennisson** (1891),
fondinto de la unua E-libro-Servo
en Estonio, Paul **Nylén** (1892),
prezidanto de la Sveda Esperanto-
Societo, Haldor **Midthus** (1900),
kunverkinto de E-lernolibro por
danoj, Mieczysław **Czerwinski** (1900),
redaktoro de **Pola Esperantisto**,
Hendrik **Bulthuis** (1901), E-ver-
kisto, Eugénie **Cense** (1901), ad-
ministrantino de la Esperantista Cen-
tra Oficejo, Frederic Charles **Hayes**,
kunfondinto de la Londona E-Klu-
bo en 1903, Izor **Gebaur** (1906),
aŭtoro de Volapuk-lernolibroj por
hungaroj, Siegfried **Lederer** (1908),
redaktisto de la volapukista **Rund-
um die Welt — Zi vol Lolik**, poste
redaktisto de la E-revuo **Ĉirkaŭ
la mondo**, kaj multaj aliaj.

En neniun rememoraĵo ni povas
legi, ke la persona lingvoŝanĝo
estus okazinta pro la manko de la
„interna ideo“ aŭ io alia, sed ĉiu
emfazas la netaŭgecon de la Vola-
puka lingvaĵo.

E-movado ne heredito, sed daŭrigo estas de la Volapuka. Nur pro tradiciaj kaŭzoj licas paroli pri du movadoj, fakte temas pri la sama. La interlingva movado pro la fiasko de la Volapuka devis ŝanĝi

sian lingvon. Tiu ŝanĝo estis treege malfacila: en la movado ĝi kaŭzis krizon, rompon, grandan refalon, la kontinueco tamen ekzistis: la celo, la tuta karaktero, eĉ

parte ankaŭ la movaduloj restis la samaj. La starto de nia movado datiĝas de 1879.

Arpád RÁTKAI
(el „Paco“, hungara eldono, 1977)

¹⁾Johann Martin Schleyer deklamas sian poemon dum la unua kongreso de la volapukistoj, 1884.08.25/28^a en Friedrichshafen:

*Per la ĉiambriľaj bataliloj de la klero
Ek al nia nova, grandioza paca kreo,
Ligilo de la amo fariĝu Volapuko nia,
Landojn kaj landojn jam de nun ĉirkaŭplektanta;
Ke nia belega de sunbrilo Tero
Por la amfratoj fariĝu Edeno;
Ĉies langoj klare akordiĝu,
pacaĵo sonoj monden feliĉflugu.*

²⁾Ludwig Lazar Zamenhof deklamas sian poemon dum la unua kongreso de la esperantistoj, 1905.08.5/13, en *Boulogne-sur-Mer*:

*La verdan standardon tre alte ni tenos;
Ĝi signas la bonon kaj belon.
La Forto mistera de l'mondo nin benos,
Kaj nian atingos ni celon.
Ni inter popoloj la murojn detruos,
Kaj ili ekkrakos kaj ili ekbruos
Kaj ili falos por ĉiam, kaj amo kaj vero
Ekregos sur tero.*

Trad. A. R.

³⁾Rilate la historion de mondlingvaj projektoj de Leibniz ĝis la nuntempo.

REVUO „POLA ESPERANTISTO“ RENOVIGITA

Post longa malfacila periodo de klopodoj, diskutoj kaj hezitoj finfine aperis n-ro 1/1986 de revuo „Pola Esperantisto“, kies nova ĉefredaktoro estas s-ino Agnieszka B. Pietrzak, konata ĵurnalistino el la Esperanta redakcio de Radio Polonia.

Eĉ supraĵa rigardo sur tiu kajero evidentigas la strebon de la nova redakta komitato revenigi la revuon al la plej aktualaj problemoj de la esperantista movado en Pollando kaj en la mondo, proksimigi ĝin al la intereso de la plimulto de polaj esperantistoj.

En la ĉefartikolo la nova redaktortino skribas interalie:

... „La revuo, kiun vi, kara Leganto, tenas en la manoj, ambiclas fariĝi vera forumo de la tuta pola E-movado, en kiu vi trovos ne nur (espereble multajn) legindaĵojn, sed ankaŭ tiujn materialojn, kiuj ebligas sanan, kreaĵon fermenton en viaĵo vico, fermenton, kiu naskas interesajn ideojn kaj iniciatojn por nia ĉiutaga laboro.“

Ni kore gratulas niajn polajn amikojn kaj ni unuanime apogas la intencon de la redakta komitato, ke „Pola Esperantisto“ fariĝu „vera forumo de la tuta pola E-movado“, promesante ankaŭ nian kunlaboradon estonte.

Bonŝancon al nia frata revuo „Pola Esperantisto“!

„BULGARA ESPERANTISTO“

KARAJ LEGANTOJ,

ABONU TUJ REVUON „BULGARA ESPERANTISTO“ — monata organo de Bulgara Esperantista Asocio.

● „BULGARA ESPERANTISTO“ estas unu el la plej malnovaj E-revuoj en la mondo — fondita en 1919

● „BULGARA ESPERANTISTO“ traktas aktualajn problemojn de la E-movado en Bulgario kaj en aliaj landoj

● „BULGARA ESPERANTISTO“ estas libera tribuno de la legantoj

● „BULGARA ESPERANTISTO“ disponigas al vi interesajn, originale verkitaĵojn en Esperanto aŭ tradukitaĵojn literaturajn verkojn de bulgaraj kaj fremdaj aŭtoroj

Jarabono: por Bulgario — 2,90 lv

por socialismaj landoj — 5,42 lv

por ĉiuj ceteraj landoj — 5,90 lv

(aŭ egalvaloro en nacia valuto)

ABONU PERE DE R E P I


ABONIGU ANKAŬ VIAJN EKSTERLANDAJN AMIKOJN!

ALILANDAJ LEGANTOJ POVAS ABONI LA REVUON ĈE LA CENTRA OFICEJO DE UEA EN ROTT-ERDAM — Nieuwe Binnenweg 176, 3015 — BJ Rotterdam, Nederlando.

LASTA LIMDATO — 10-a de decembro 1986.

ATENTU! LA ELDONKVANTO ESTAS LIMIGITA!

LA REDAKCIO



(Daŭrigo de n-ro 10/1986)

Historia optimismo de bulgara esperanto-movado (1936–1944)

Dum la pezaĵoj de la Dua Mondmilito la unuecforta BEA helpis ankaŭ al UEA. En Bulgario, estis presitaj du numeroj de la UEA-organo „*Esperanto*“: n-ro XXXVI, 486 (6), aŭgusto-decembro 1940 (en urbo Sevlievo) kaj n-ro XXXVII, 4, julio-aŭgusto 1941. Krome, en la traktata periodo aperis tri „Albumoj“ — adresaroj de bulgaraj esperantistoj (du en 1939 en Sofio kaj en Ruse; la tria, aperinta en Ruse 1942, enhavis ankaŭ adresojn el eksterlando).

Por la plua popularigo de la bulgara bel-literaturo konsiderinde kontribuis Ivan Krestanov, ADA, Hristo Gorov, David Sasonov, Krestjo Georgiev, Geo Hârşev, Nikola Vasiliev k. a.

Al Dimitro Zlatarski, Asen Gri-gorov, Hristo Gorov aliĝis per sia poezio ankaŭ la plej elstara neŭtrala poeto Petro Jordanov (1884–1952), kiu estis disreviĝinta pri la neŭtralismo. La kom-pleta malpermeso de Esperanto en faŝisma Germanio (1933–1936) unue lin malesperigis kaj li ĵetis sian „liron melodian“, sed li re-prenis ĝin dum kaj post la landa konferenco en januaro 1937, dedi-ĉita al vastigo kaj plibonigo de la poresperanta propagando per „Bul-gara Esperantisto“ kaj la bulgar-lingva gazetaro. Dank’ al tiu unika konferenco, pro la brila perspek-tivo, kiu refreŝigis la aktivulojn per optimismo, ankaŭ li reakiris sian kuraĝon de poeto kaj esperan-tisto. En tiu decida momento Petro Jordanov verkis sian ĉef-poemon „Ne Plu Cedi!“, en kiu li skizas sian firman kredon kaj decidon:

„Mi kredas je l’estont’ per kredo
fora,

je ĉi estont’ ne povas mi ne kredil
Premita de la zorgo kaj de l’Sorto,
decidas tamen mi: ne cedi, ne plu
cedil

(Majo-junio 1937)

Petro Jordanov estis prezidanto de BEA dum tri jaroj (1933–1936). La XXIII Kongreso de Bulgara Esperantista Asocio (1936, en Veliko Târnovo) lin reelektis en la konsisto de la Centra Estraro de BEA, kie li estis vicprezidanto, sed — kio estas tre grava — li daŭrigis esti „respondeca redaktoro“ de ga-zeto „Bulgara Esperantisto“ (1934–1942). Tial, pritaksante la enhavon

de la oficiala Esperanto-organo en nia lando el kontraŭfaŝisma vid-punkto, oni ne devas forgesi, ke la merito apartenas ne nur al la aŭ-toro kaj redakcio, sed ne malpli ankaŭ al la „respondeca redaktoro“ Petro Jordanov, kiu rekte, kiel ŝirmilo, respondicis antaŭ la ŝtat-instancoj pri la enhavo kaj tenden-co de la presorgano „Bulgara Es-perantisto“. Progresemaj materialoj svarmis sur la paĝoj de „Bulgara Esperantisto“, ekzemple kriti-koj kontraŭ rasismo, artikoloj kun aludo pri la suspendita²⁾ Kon-stitucio de Bulgario, informeto pri la III Kongreso de IPE (Internacio de Proleta Esperantistaro) en 1937, pri barbareca rilato de la fa-ŝistoj al la kulturaj valoroj, pri la neelĉerpebla forto de la homaro en kreado de internacia kulturo, pri alvokoj por helpi al esperantistoj en Italio, Hungario, Kroatio k.a. Ekzemple, la organizita festo „Esperanto-Tago“ en Budapeŝto (1942), el Bulgario estis senditaj tri telegramoj el urboj Ruse kaj Gabrovo, kaj el vilaĝo Galiĉe (distrikto de Vraca).

Dum tiu periodo aperis novaj Esperanto-poetoj. Marin Bâlgaren-ski priokantas la rolon de Justo por la Esperanto-movado en sia poemo „Ni“ (marto-aprilo 1936):³⁾ Car ni scias, ke la Justo,
ĉiam ĝi protektos nin
kaj kun viglo en la brusto
ni agados ĝis la fin!“

Abunde radias optimismo ankaŭ el la poezio de Violin Oljanov (Zefi-ro). En poemo „La Senmorta Albatr(os)“ (januaro-februaro 1937) li konstatas kaj trafe prognozas (post kiam faŝistoj ĵetis du fojojn po-bombo en la Klubejon de Esperan-to-Societo „Albatr(os)“ en Varno (fine de 1936):⁴⁾

„Ĝin ne timigas ŝtono,
rabio kaj obskur’

Tra ŝtonoj kaj tra dornoj
progresas la kulturo!“

Per sia debuta poemo „Ni“⁵⁾ (ja-nuaro 1939): Georgi Dikovski est-as movata de internaciisma entu-ziasmo al la [al]loge brila estonteco „Ni venas — mil-miloj —
sen ajnaj armiloj,
sen ajnaj insidoj —
ni — teraĵ geidoj.
Ni ĵuris purkore:
labori fervore

kaj spite al baroj
por nova homaro,
por nova estonto —
Esper’ Triumfonta!“

La kvara nova, sed ne lasta poeto estis David Sasonov, kiu sendis al la redakcio de „Bulgara Esperan-tisto“ (septembro-oktobro 1941) be-lan poemon „Historio de la Homar-o“, kiun la redakcio aprobis, sed ne kuraĝis aperigi. La redakcio tamen publike anoncis al D. Saso-nov, ke lia poemo estas bona kaj aprobita, sed la redakcio ĝin metas en paperujon, kie ĝi atendas „Pli oportunan epokon“. Ĉu D-ro St. Ĝuĝev, redaktoro, aŭ Ivan Kere-midĉiev, gvidanto de rubriko, aŭ la parencoj de David Sasonov, aŭ iu ajn konservis kaj gardas en se-kura loko la manuskripton de tiu eminenta verko?

La internacia solidareco inter la kontraŭfaŝismaj esperantistoj rapide kreskis kaj vastiĝis. Post ĉesigo de „Bulgara Esperantisto“ (en julio 1942) Dimitro Ivanov el urbo Ruse traktis kaj interkonsen-tis (pri la kondiĉoj) kun hungara Esperanto-gvidanto profesoro Jo-zefo Miĥalik (prezidanto de Hun-garlanda Esperanto-Komitato), por ke „Revuo-Bulteno“, organo de Bulgara Esperanto-Movado, estu presata en Budapeŝto.

Al Bogdanka Pamukĉijska (el maĥala Velĉovska, apud urbo Tro-
jan) D. Ivanov komisiis serĉi re-daktoron. En aŭgusto 1942 ŝi proponis (per letero) al la aŭtoro de tiu ĉi artikolo. Mi respondis al ŝi, ke komence de septembro 1942 mi veturos al Sofio por ekzamenoj en la Universitato kaj ke tie trovos kompetentan esperantiston por re-dakta laboro. Estis invitita Ivan Dimitrov Keremidĉiev — Esperov. Li konsentis kaj siaflanke diris, ke ni devas inviti D-ron Stojan Ĝuĝev, (tiam docento en la Kon-servatorio), des pli ĉar li okupas ofiĉiale la postenon de Esperanto-redaktoro ĉe BEA. Mi serĉis D-ron St. Ĝuĝev en lia loĝejo, str. Par-ĉevĉiĉ 13, Sofio. Li forestis, tial mi lasis al li leteron (en la poŝta kesto) kun detaloj, kial mi serĉas lin kaj proponis renkontiĝon de la trio (Ĝuĝev, Keremidĉiev kaj Mur-
gin).

D-ro St. Ĝuĝev skribe konfirmis, ke li akceptas entuziasme la taskon. Plue ni kunvenis en lia loĝejo, preparolis kiel ni laboros kaj kiujn ni varbos kiel kunlaborantojn. En 1943 aperis tri numeroj de „Revuo-Bulteno“ (en junio, septembro kaj decembro). La eldonkvanto de ĉiu numero de „Revuo-Bulteno“ estis mil ekzempleroj. Krom la redaktoroj kunlaboris al la gazeto Violin Oljanov, Vasil Cočov, Ivan Bataklijev — Magdin (el Plovdiv), Dimitro Ivanov, administranto de la gazeto (el Ruse) kaj deko da aliaj entuziasmoj, kiuj en mallongaj artikoloj, eseoj, raportoj skizis momentojn el la tiama bulgara Esperanto-movado kaj plue lerte pentris la proksiman kaj malproksiman estontecon.

Sed en la periodo 1936—1944 ne ĉiam ĉio iris glate. Estis ankaŭ konfliktoj, kiuj markis la etapon de disvolvigo. Internajn konfliktojn kaj obstaklojn el ekster la Esperanto-movado oni klopodis superi. . . Fine de 1936 faŝistoj atakis du fojojn per bomboj la Klubejon de Esperanto-Societo „Albatros“ en Varno. Spite al la atakoj tiu urba E-societo daŭrigis sian kulturen agadon, tamen en alia klubejo, ĉar la malnova estis grave difektita de la eksplodoj.

Kiam en 1937 komencis aperi „Esperanto-Paĝo“ en ĵurnalo „Zarja“, la plej respondecaj gvidantoj de BEA aplaŭde aprobis la efikan kaj larĝskalan propagandon de Esperanto, sed samtempe ili ruze sin distancigis dis de ĝi sub preteksto, ke tio estas „privata“ iniciativo (t. e. aranĝo de laboristaj esperantistoj). Malfacila momento alvenis en majo 1939, kiam laŭ listo kaj ordono de la polico el la Esperanto-Societo de Sofio estis eksigitaj 20 elstaraj laboristaj esperantistoj (Asen Grigorov, Angel Petkov — Angelo, Trajana Petkova k. a.). Laŭ la sama maniero okazis eksigoj el la Esperanto-societoj tra la tuta lando. Tiel oni faris la duan „purigon“ de BEA, forigante la „dangerajn elementojn“.

La lasta Kongreso de Bulgaraj Esperantistoj dum la kapitalismo — la XXVII, okazis en urbo Loveĉ (1940) ne sub gvido de la Centra Estraro de BEA, sed sub gvido de la Redakcio de „Bulgara Esperantisto“ kaj ties kunlaborantoj. Ekde tiu jaro (1940) la Esperanto-movado plue estis gvidata de tiu Krom-Centro. En 1941 la plej respondecaj gvidantoj de BEA elpaŝis publike per minaco pri tria „purigo“ de BEA, sed tiun minacon ili ne efektivigis, verŝajne pro timo, ke faŝisma Germanio, provizore prosperanta sur la militfrontoj, postulos malpermeson de Esperanto ankaŭ en Bulgario. La minaco estis ripetita en decembro 1942, kiam pluraj centraj ĵurnaloj aperigis artikolojn kontraŭ Esperanto kaj kontraŭ la komunismo.

En 1943 okazis publike ne anon-

cita Esperantista Konferenco dum la tagoj de la Specimena Foiro en urbo Plovdiv. La partoprenantoj estis individue invititaj per leteroj privataj. La aŭtoro de tiu ĉi artikolo ricevis jenan inviton sur poŝtkarto (10.IV.1943):

„Skribi multon mi ne volas, ĉar vi certe eksciis de viaj verdaĵ amikoj pri la arangaĵa neoficiala renkontiĝo en Plovdiv dum la foiro.

Aŭdigu vin al s-ano Esperov, li scias ĉion detale.

Ni devas utiligi tiun okazon. Do, bonan venon! Ni vin atendas. Invitu aliajn!

S-ane via: Ivan Bataklijev, Plovdiv, str. Gladston (52.)

La okazigo de tiu neoficiala Konferenco kaŝis en si certan riskon. Sed post la historia venko de la Soveta Armeo apud Stalingrad kontraŭ la milit-maŝino de faŝisma Germanio, en la esperantista medio de Bulgario kreigis favora etoso por ankoraŭ pli firma kontraŭstaro al la faŝismo en nia lando, tial la organizantoj ignoris la danĝeron.

Mi mem ne povis partopreni la Konferencon, ĉar antaŭstaris a mi universitataj ekzamenoj, sed mi ricevis poŝtkarton de Ivan Esperov (Sofio, 6.V.1943):

„... En Plovdiv renkontiĝis multaj s-anoj el dekoj da lokoj. Ni promenis, fotografis nin kaj pridiskutis multajn demandojn koncerne nian aferon. Ni decidis subteni s-anon Dimitro Ivanov el Ruse pri la 4-paĝa Aldono (temas pri gazeto „Revuo-Bulteno“ — klarigo mia: C. M.) al „Hungara Heroldo“, por nia (landa) Esperanto-movado. Sendu al li artikolojn kaj abonkotiĝojn (unu abonkotiĝo — 25 levoj). Sendu al mi kopion de via artikolo, (sendita al Dimitro Ivanov). „Al Verdaĵ Pioniroj“ Sincera salutoj: Iv. Esperov, Saŝa, Emil“.

El mil abonantoj al „Revuo-Bulteno“, organo ne de BEA, sed de la „Esperanto-movado en Bulgario“ (presita en Budapeŝto kiel Aldono al gazeto „Hungara Heroldo“), nur unu esperantisto plendis al la Centra Estraro de BEA. La plendo venis el urbo Pazarĝik. Dimitro Ivanov (el Ruse), administranto de „Revuo-Bulteno“, multege korespondis lige kun la varb-kampanjo al tiu modesta gazeto. La 6-an de majo 1943 li skribis al mi:

„... Antaŭ ni staras kruta vojo, sed ni kuraĝe laboru. S-ano... el Pazarĝik malaprobis nian iniciaton. Li ankoraŭ opinias la Centran Estraron de BEA vivanta kaj konsideras la Statuton de BEA severe leĝa. Mi postulis permeson de la Centra Estraro (de BEA) pri mia nova streĉo-oferdona laboro.“

Sendube la administranto de „Revuo-Bulteno“ faris ĉion por informi la Centran Estraron de BEA kaj petis permeson, eĉ benon al la nova gazet-eldona iniciato, sed li ne ricevis respondon. Per

poŝtkarto (1.VI.1943) al mi Dimitro Ivanov informas:

„... Per la jena poŝtkarto mi kvitancas la ricevon de la monsumo 60 levoj. . . El Plovdiv, Trojan, Ruse, Burgas, Loveĉ, Varna kaj multaj vilaĝoj la samideanoj plene subtenas nin. Sofianoj silentas indiferente. . .“

Bonvolu ne forgesi, ke tiu ĉi traktado kaj diskuto per leteroj okazas antaŭ la apero de n-ro 1 de „Revuo-Bulteno“ kaj en la komenco de la varbokampanjo. En la supra citaĵo la vortoj „Sofianoj silentas indiferente“ rilatas la oficialan Centran Estraron de BEA, elektitan dum la XXVII Kongreso de Bulgaraj Esperantistoj en Loveĉ (1940), sed ne la esperantistaron en Sofio, nek la Krom-Centron (Redakcio kaj kunlaborantoj!)

Incitita pro la protesto el Pazarĝik, la Centra Estraro (pli precize la prezidanto) de BEA pretigis kaj dissendis cirkuleron al ĉiuj Esperanto-societoj kaj individuaj membroj (de BEA), malaprobante la eldonon kaj kritikante la iniciatintojn. Al tiu altdvena cirkulero la administranto de „Revuo-Bulteno“ Dimitro Ivanov digne respondis (ankaŭ cirkulere), ke se la Centra Estraro de BEA nenion entreprenas, la membraro ne deziras stari senfare.

En 1944 en iuj Esperanto-societoj kaj grupoj neoficialaj oni eldonis unuopajn numerojn de manskribitaj gazetoj. En vilaĝo Galice aperis du numeroj de tia gazeto, skribita en aparta ordinara kajero (en Esperanto). Tiun manieron de eldonado oni praktikis plejparte en la grupoj de malliberigitaj esperantistoj en la prizonoj en Sofio, Sliven, Veliko Tŕrnovo k. a.

En la periodo 1936-1944 la bulgaraj esperantistoj vivis kaj agadis kun la entuziasmo de unuecfontra kunlaboro. Kaj la rezultoj de tiu agado havis tre gravan edukon efikon inter la esperantista amaso. La grandega plimulto de la bulgaraj esperantistaro apartenis al la laboristaj esperantistoj. Multaj el la honestaj neŭtraluloj fariĝis aŭ konsiderinde proksimiĝis al la koncepto de la laboristaj esperantistoj pri unueco, kunlaboro kaj progresigo de nia lando kaj popolo en la soci-politika, ekonomia kaj kultura sferoj kaj plivigliĝo de nia partopreno en la internacia vivo de la homaro.

Ideologoj, konvinkitaj kaj plej ardaĵ realigantoj de la unuecfontra agado estis kaj estas ankaŭ post la venko de la socialisma revolucio en nia lando Nikola Aleksiev kaj Asen Grigorov, Ĥristo Gorov kaj Krestjo Karucin, Ivan Keremidĉiev kaj Violin Oljanov.

Canko MURGIN

¹⁾Suspendi (juro) — 1. Provizore deflankigi iun de la plenumado de lia ofico; 2. Cesigi la aplikadon de leĝo.

ELSTARA PUBLICISTO KAJ ESPERANTISTO



Floroj por la jubileulo

Ivan Keremidčiev-Esperov, aktiva batalanto kontraŭ la faŝismo, fervora E-aganto, ĵurnalisto, kiu dum pluraj jaroj aktive kunlaboris al la bulgara kaj Esperanta gazetaro, estiĝis 75-jara. Lian jubileon oni festis en kadre de solenaĵo organizita, la 3-an de septembro j. k. en la Sofia Esperanto-Domo de Kulturo „M. Gorkij“, lige kun la 42-a datreveno de la Socialisma Revolucio en Bulgario. Post la raporto de la prezidanto de BEA Hr. Gorov pri partopreno de bulgaraj esperantistoj en la kont-

raŭfaŝisma batalo, sekvis rakonto pri la vivo de Ivan Keremidčiev prezentita de lia kunaganto kaj bona amiko Nikola Aleksiev honora prezidanto de MEM. En la malfacilaj por Bulgario jaroj de faŝismo Iv. Keremidčiev, metante en danĝeron sian vivon, organizis kontraŭfaŝismajn kunvenojn, fondis grupojn por batalo kontraŭ la tiama registaro. Vivante en kontraŭleĝeco, li sukcese utilis la progreseman bulgaran gazetaron por disvastigi siajn ideojn kaj por klarigi diversajn metodojn de batalo kontraŭ la faŝismo. Gravan rolon en lia vivo ludis la lernado de Esperanto. Multajn el siaj taskoj li plenumis kune kun aliaj esperantistoj. Dank' al lia sindona laboro en la malfacilaj jaroj 1934-1938 la E-movado estis sufiĉe vigla. Kiel redaktoro de la Esperantaj eldonaĵoj Ivan Keremidčiev-Esperov multe kontribuis al ties organiza stabileco.

Pro sia multjara senlaca laboro Ivan Keremidčiev estas honorita per altaj ŝtataj distingoj kaj per la plej altaj distingoj de BEA.

Dum la kunveno lin salutis Hristo Gorov — en la nomo de CE de BEA, d-rino Cveta Stamenova — en la nomo de UE de BEA, Bistra Dojčinova — en la nomo de DE de BEA, Sofio, kaj multaj esperantistoj, liaj amikoj kaj parencoj.

La solenaĵo finiĝis per belarta programo, en kiu plej kortuŝa momento estis la persona saluto al Iv. Keremidčiev fare de la kantistino Karamfilka Adamova, kiu en kanto simbole prezentis la riĉan vivon de la veterano.

Sanon kaj multajn fortojn en via plua Esperanta kaj porpaca agado, estimata s-no Keremidčiev!

N. VALJAVIČARSKA

LABORBRIGADO EN KARLOVO

Laŭ propono de la Urba Komitato de BKP en Karlovo kaj kun la helpo de DE de BEA en Plovdiv, E-societo „V. Levski“ en Karlovo organizis la 15.7.-3.8.1986 distriktan junularan laborbrigadon. Partoprenis 18 gejunuloj, inter ili 8 esperantistoj el Pollando kaj unu junulo el Vjetnamio. Ĉefkomandanto de la brigado estis la prezidanto de la oka societo, aktivo de MEM kaj gvidanto de la Scienc-Teknika Informa E-Centro de BEA en Karlovo ing. Bojidar Leonov.

La brigadanoj laboris por bonkonstruado de la urbo lige kun la 150-a datreveno de naskiĝo de la Apostolo de la bulgara libereco Vasil Levski, kiun oni solene festos en 1987.

En la liberaj horoj por la brigadanoj estis organizitaj multaj amuzaj aranĝoj — diskoteko, dancvesperoj, ekskursoj, renkontiĝoj kun partoprenantoj en aliaj junularaj brigadoj k.a.

La 1-an de aŭgusto okazis solena fermo de la brigado Gastis la vicprezidanto de DE de BEA Vladimir Jelev kaj ĝia sekretario Fani Mihajlova el Plovdiv.

B. Leonov prezentis la rezultojn de la laboro, kore dankis al ĉiuj pro ilia sindona laboro. Premiojn ricevis la plej laboremaj brigadanoj: Jolanta Knoh el Pollando, Can Zan el Vjetnamio, Ljubomir Jelev el Plovdiv kaj Stanislav Danin el Sopot. Al la alilandanoj la ĉefkomandanto donacis memoraĵojn kaj ĉiuj brigadanoj ricevis specialajn brigadanajn insignojn. En la nomo de DE de BEA la ĉeestantojn salutis F. Mihajlova kaj invitis ilin denove partopreni E-brigadon en Bulgario. Si donacis al la brigadanoj E-gramofondiskojn kaj -librojn.

En la nomo de la eksterlandaj partoprenantoj Jolanta Knoh varme dankis pro la amika akcepto en Karlovo kaj la tre agrabla tendara etoso.

Interŝanĝo de adresoj kaj la promesoj pri novaj renkontiĝoj estis natura finaĝo de la neforgeseblaj brigadanaj tagoj.

Vladimir JELEV



Sur la ŝoseoj de Lukovit-kaj Teteven-regiono oni ofte povas vidi viron sur biciklo kun flirtanta verdstela flageto, kiun ĉiuj konas laŭ lia kromnomo „Foto Esperanto“.

Jen — en la laŭvica vilaĝo aŭ urbeto li starigas sian tripledan stativon kun malnovmoda fotoaparato kaj... la laborejo sub libera ĉielo de „Foto Esperanto“ jam funkcias.

Kiu fakte estas tiu ĉi homo kun sincera amika rideto, preta fiksi sur la fotobendo ĉiun interesan eventon, ĉiun interesan figuron?

Lia vera nomo estas Nikola Peev. Li naskiĝis la 18-an de aŭgusto 1906 en v. Ĝurovo, distrikto de Sofio, en malriĉa multinfana familio. Jam kiel lernanto en la gimnazio en urbo Botevgrad, en 1924 li estiĝas membro de la lerneja abstineca societo „Saviĝo“ kaj lernas Esperanton. Laŭ lia propono oni fondas lernejan E-societon „Verda Radio“. Li estiĝas koro kaj animo de la societo.

Por Nikola Peev la lernado de la internacia lingvo Esperanto ne estas memcelo, sed rimedo por edukado de nova homo kun nova animo, nova pensmaniero. Li formiĝas kiel arda esperantisto-internaciisto kun klara kompreno pri la granda rolo, kiun povas ludi la lernado de Esperanto por amikigo de homoj el diversaj landoj. Foje dum iu societa kunsido, li deklamas la de li tradukitan „Simbolo-kredo“ de Ĥristo Botev. Ekde tiu momento li ricevas sian kromnomon „Esperanto“, kiel ĝis nun nomas lin liaj samvilagaĵoj.

En 1925 pro malriĉeco Nikola Peev forlasas la lernejon. Per la helpo de siaj amikoj li havigas al si fotoaparaton kaj komencas rondvojaĝi tra la vilaĝoj de Botev-

„FOTO ESPERANTO“

grad, Teteven kaj Lukovit — vizitadas lernejajn festojn, foirojn, edziĝifestojn.

Sur la antaŭa rado de lia biciklo flirtas verdstela flageto. Ne pro deziro gajni monon, sed por fiksi momentojn el la ĉiutageco de la ordinarnaj homoj, li ekveturas tra la vilaĝoj. Sur la dekstra malsupra angulo de ĉiu foto estas kvinpinta stelo kaj surskribo „Foto Esperanto“, kaj la fiksita momento estas priskribita surdorse en Esperanto.

Jam dum la 30-aj jaroj Nikola Peev starigas kontaktojn kun esperantistoj el Anglio, Germanio, Jugoslavio, fora Japanio kaj aliaj landoj. En liaj korespondaĵoj ĉeftemo estas la batalo por paco kaj

peranto sur la fotojn, sed li ambicie defendas la rajton de sia marko. La arestado kaj la monopunoj ne malkuraĝigas lin. Kun pedagogia talento li okazigas kursojn por lernado de la Internacia Lingvo, en kiuj li mem estis instruisto. Al la kursanoj li ĉiam klarigis, ke Esperanto estas intime ligita kun la batalo por paco, abstineco kaj homa feliĉo.

Ankaŭ la poezio ne estas fremda al li. Lia versaĵo „Dimitrov mortis“ trovis lokon en revuo „Internacia Kulturo“. Liajn fotojn aperigis multaj gazetoj kaj revuoj.

Nikola Peev — Esperanto, tiu fidela soldato de la partio, vivas inter ni — ege modesta, inklina al ĉio nobla kaj bela. Jam 80-jara, li aspektas ĉiam ankoraŭ june



Lernejana Esperanto-kurso en vilaĝo Ĝurovo, distrikto de Sofio, 1951.

interkompreniĝo de la popoloj el la tuta mondo.

En la personeco de Nikola Peev bonege kunvivadas la esperantisto, la abstinenculo kaj la batalanto por paco kaj socia justeco. Li partoprenas ĉiujn kongresojn de bulgaraj esperantistoj kaj kuraje defendas la rolon kaj la signifon de Esperanto. La faŝista polico malpermesas al li meti la emblemon de Es-

vigla, inspirita de la ideoj pri paco kaj frateco inter la popoloj, flama apostolo de la internacia lingvo Esperanto. Al senlaca laboro por disvastigo de Esperanto Nikola Peev dediĉis pli ol 60 jarojn de sia saĝe travivita sencoplena vivo.

Gratulojn okaze de Via 80-jariĝo, „Foto ESPERANTO“!

Marin NANOV

HEJ — historio kaj perspektivoj

Ĉu vi konas la vivon de Hungara Esperanto-Junularo (HEJ)? Se ne, nun vi havas eblecon enrigardi ĝian ĉiutagecon.

Ni enrigardu iomete en la historion de la hungaraj junulara movado. Eble vi eksentos la novajn ventojn, kiuj nun blovas en nia movado, kaj la celon, kiuj estos atingita espereble en la proksima futuro.

Hungara Esperanto-Asocio estis fondita en oktobro 1960. Laŭ ĝia statuto funkcias Junulara Komisiono (HEJ) okupiĝanta pri junulara Esperanto-movado. HEJ-funkciuloj estis nomumitaj fare de HEA-estaroj, sed komisionanoj praktike ne estis elektitaj. Dum certa periodo aktive laboris fervoraj gejunuloj-esperantistoj.

Kion faris HEJ dum la lastaj jardekoj? En la sesdekaj jaroj menciindas grava evento: en 1966 la 22-a IJK en urbo Pécs kun 900 partoprenintoj! Post tio kompreneble multe vigliĝis la hungara E-movado. En multaj lernejoj komenciĝis E-kursoj, Esperanto fariĝis fakultative lernebla fremda lingvo, kaj en Universitato ELTE ekfunkciis E-fako. Do, en la sepdekaj jaroj montriĝis bezono de pli multaj E-aranĝoj por la junularo. Kion HEJ proponis al ili? Printempe okazis — kaj eĉ nun ĉiujare okazas — 3-taga Junulara Esperanto-Renkontiĝo (JER), ĉiam en alia hungara urbo, sed kun internacia partoprenantaro. Ĉiusomere ĉ. 300 mezlernejanaj povis ĝui unusemajnan ripoztendaron apud rivero Tisza aŭ lago Balatono. En la tendaro estis E-lingvokursoj, ankaŭ por komentantoj, kaj ĝenerale la partoprenintoj poste regule venis al aliaj E-aranĝaĵoj, vizitis E-klubojn, kreskigis HEJ-membraron. Fine de la sepdekaj jaroj estis organizitaj labortendaroj (Centra Internacia Esperanto-Laborbrigado (CIEL), kiuj same donis bonajn eblecojn ĝui internacian etoson. Por gestudentoj HEJ kaj la E-fako de Universitato ELTE kune organizis Studentajn Aŭtunajn Forumojn (SAF), kiuj pruvis al la gejunuloj, ke Esperanto estas uzebla kaj uzenda ne nur hodie, sed ankaŭ science, en ĉies propra fako.

La jarojn de 1980 ĝis 1982 karakterizis vigla junulara movado: la menciitajn E-aranĝojn partoprenis pli kaj pli da junaj esperantistoj. Nian agadon aprobis kaj subtenis ankaŭ Hungara Komunisma Junulara Asocio (KSA), kun kiu en 1982 HEJ kontraktis pri daŭra kunlaboro.

La kulmino de plurjara movada aktiveco estis organizado de la 39-a IJK en 1983 en urbo Debrecen kun preskaŭ 700 partoprenintoj. Sed post tiu kongreso anstataŭ la atendata ekprospero de la movado, la agado de HEJ malfortiĝis, kaj la debrecena IJK restis nur kiel lasta mejloŝtono de pasinta, bela epoko.

Jam komence de la 80-aj jaroj ekaperis la bezono transformi, plidemokratiigi la agadon de HEJ. La organiza aparato malfleksebligis kaj ĉiam pli multaj junaj Esperantistoj restis ekster la movado, do la momento por ŝanĝoj rapide maturiĝis.

Malfraŭaŭtune en 1985, helpe de iniciato de HEJ-aktivuloj kunvenis aktivula grupo de HEJ-anoj por unu semajnfino en Párkány (Sturovo), Ĉeĥoslovakio. La kunvenon partoprenis reprezentanto ankaŭ de HEA. Tiam HEJ-aktivuloj esprimis sian intencon renovigi la junularan movadon en Hungario, kaj konsente kun la HEA-reprezentanto elektis 20-membran

provizoran komitaton de HEJ, kiu kunvokis la junularon al la okcident-hungara urbo Szombathely en februaro de 1986. Tie okazis tre akraj, viglaj diskutoj. Finfine oni decidis, ke HEJ restu organiza parto de HEA, sed havu pli da organiza sendependenco, ke HEJ plidemokratiigu sian aparaton kaj agadmanieron. La ĉeestintoj decidis pri kunvoko de hungaraj esperantistoj pli junaj ol 35 jaroj por elekti propran gvidorganon.

En aprilo de 1986 okazis la elekto, dum JER, en suda Hungario, Orosháza. La provizora komitato laborinta ekde la kunveno en Párkány, transdonis siajn funkciojn al la nova 13-membra estraro. Ankaŭ en Orosháza la estraro elektis la prezidanton, sekretarion kaj vicprezidanton de HEJ. La elektojn ĉeestis unu reprezentanto de HEA, kaj post Orosháza la estraro de HEA aprobis la rezultojn.

Fruomere de la sama jaro HEJ organizis sian estrarkunvenon en la apud-budapeŝta urbo Gödöllő por resumi sian agadon ekde Rárkány kaj konkrete decidi pri sia estonta agado — kaj teorie, kaj praktike. Jam en Párkány fondiĝis Budapeŝta Junulara Esperanto-Organizo (BEJO), celante la kunigon de junaj hungaraj esperantistoj restintaj ekster la organizita loka aŭ faka klubo vivo. Nova ideo de BEJO estas la regula organizado de t.n. „Tutlanda Klubo“, kie povas kunveni praktike ĉiuj junaj esperantistoj.

HEJ decidis prilabori resp. reefektivigi kontraktojn kun hungaraj sociaj organizoj — ekz. Komunisma Junularo, Packonsilio, Sindikatoj kaj Asocio de Lernejoj Kooperativoj.

En Gödöllő la HEJ-estraro komisiis respondeculon pri diversaj taskoj koncerne terenojn ĝis nun ignoritajn, ekz. interna cirkulero de HEJ, propaganda agado, regula kaj altnivela organizado de aktivulaj seminarioj (trejnado kaj informado de interesitoj), faka aplikado de Esperanto kaj turismo.

HEJ intencas aktivigi la jam ekzistantan piramidon reton de departementaj kaj lokaj junularaj respondeculoj. Ankaŭ tiun ĉi taskon plene aprobas la nova HEJ-estraro kaj estis komisiita respondeculo ankaŭ pri tio.

Espereble ankaŭ la nova HEJ-estraro per siaj novaj metodoj akiros tiom da sukcesoj, kiel la antaŭa organizo de HEJ en la sepdekaj jaroj.

En la Jubilea Jaro 1987 la tradicia JER estos dediĉita al la centjara datreveno. JER havos specialan programon, kaj HEJ kunlaboros kun TEJO-KSA en organizado de antaŭ-JER-a KSA-seminario okazanta samloke kun JER, en Gödöllő. HEJ kontribuas al la Jubileo ankaŭ per aliaj aranĝaĵoj, ekz. Somera Unusemajna Feriado.

Certe, vi jam havas pli ĝustan imagon pri HEJ kaj ties agado. Se vi vere trovis entiu ĉi artikolo uzeblajn ideojn, spertojn, la artikolo certe ne estas vane skribita.

Jozef MADARAS,
sekretario de HEJ

HARDIGO DE JURNALISTO KAJ REDAKTORO

Nikola Aleksiev: „La Ruĝa Torĉo“ (Laŭ la Dornoplenaj Vojoj de la Proleta Gazetaro), bulgarlingva, 20×14,5 cm, p. 130. Tole bindita. Prezo: 1,31 levoj. Profizdat, 1986.

Jam en sia junaĝo la aŭtoro decidis batali por pli bona vivo de la homoj—vivo sen militoj, sen ekspluatado. En la gimnazio li provas sian plumon de komencanta ĵurnalisto (1928). Pli poste li samtempe kontribuas per artikoloj kaj tradukoj al ĵurnalo „Studenta Tribuno“ (1928—1930), al la E-gazetoj „Balkana Laboristo“ (1929—1931), „Internacia Lingvo“ (1931—1932), „Laborista Kamparana Korespondanto“ (1932—1934) kaj al la sindikata ĵurnalo „Unueco“.

Tiujn periodaĵojn N. Aleksiev ankaŭ redaktis. Intertempe venis arestoj, juĝprocesoj, malliberigoj, mi-

tingoj, strikoj, interpuŝigoj kun policanoj. La vivo vojo de la aŭtoro jen kruciĝas, jen iras paralele kun la vojoj de elstaraj gvidantoj de la laborista Esperantomovado (St. Nenkov, Simeon Petrov, Hristo Gorov, Atanas Lakov, Tinka Kolarova, Angel Petkov, Ivan Keremidčiev), de la komunista, junkomunista kaj sindikata movadoj. Sekvas kvara longa enprizonigo (1935—1941).

La historiistoj de la Komunista Partio, de Esperanta sindikata kaj ĵurnalista organizoj trovas ĉi tie valorajn epizodojn, dinamikajn funkciojn kaj interesajn faktojn kaj farojn. La stilo de la verko estas altira, flua, klara, elokventa. La aŭtoro vin gvidas tra jaroj, redakcioj, malliberejoj kaj historiaj eventoj, popularaj manifestigoj. Tiu verko en Esperanto-traduko estus bonega legolibro en E-kursoj por progresintoj kaj perfekta faka krestomatio pri historio de la bulgara E-movado.

Pro sia internaciisma enhavo la verko estus alloga legaĵo ankaŭ por eksterlandaj esperantistoj.

YOSHIAKI MIZUNO

Raporto el Eŭropa Esperantujo

(Daŭrigo de n-ro 10/86)

Riga

La 26-an de aprilo mi bonorde atingis la stacidomon de Riga, la ĉefurbo de Latva Respubliko de Sovetunio. Jam atendis min sur la perono tri esperantistoj.

Unu estis s-ro Janis Rukšans, prezidanto de Latva filio de ASE (Asocio de Sovetaj Esperantistoj), kaj ĉefredaktoro de revuo pri ĝardeno kaj arbaro. La dua estis f-ino Olga Dukul, kiu laboras en la Latva Societo por Amikeco kaj Kulturaj Rilatoj kun Fremdaj Landoj. Oni kondukis min al ambaŭ organizoj, kie mi faris etan paroladon.

Posttagmeze Janis denove venis al mia hotelo kaj ni kune veturis per tramo al la Katedralo de Sankta Petro, kiu staras en la centro de la urbo, kaj de la supro de alta turo mi plene ĝuis la belegan panoramon de la tuta urbo. Tamen, malfeliĉe, blovis ventego kaj estis tre froste, do mi ne povis resti tie longe.

Poste ni veturis per aŭto al la granda tombejo, kie dormas ĉefe la soldatoj pereintaj en la Unua Mondmilito. Tie troviĝas giganta skulptaĵo de patrino kun du infanoj, ĉe kies ambaŭ flankoj staras ŝtonaj soldatoj en mezepoka vestaĵo.

Vespere mi sekvis Janis al la Kultura Domo por Laboristoj, kie oni havis semajnan kunvenon de Esperanta Klubo „Fenikso“. Partoprenis ĉirkaŭ 30 klubanoj, kaj oni petis min rakonti pri la Esperanta movado en Japanio. Mi ege miris pri la kapableco kaj fervoreco

de latvaj esperantistoj, kiuj tre lerte utiligas la Internacian Lingvon kaj ankaŭ havas grandan intereson kaj scion pri aferoj en Japanio.

Post la kunveno Janis akompanis min al tre impona teatro, en kiu oni prezentis popularajn dancojn — latvaj kaj alilandajn. Belaj kostumoj kaj supera prezentado! Dum la du horoj kaj duono de ludado mi estis kvazaŭ en sonĝo. Mi miris ekscielinte, ke la gedancistoj estas ĉiuj amatoroj.

Fine de la eventoplena tago mi havis agrablan tempon en la hejmo de Janis kaj revenis al la hotelo preskaŭ meznokte.

Antaŭtagmeze de la sekva tago mi vidis s-ro Talis Bercis, vicprezidanto de la Latva filio de ASE, kiu bonege parolas Esperanton. Ni kune vizitis la profesorojn en la fakultato de fremdlingvaj studoj de la Ŝtata Universitato de Latvio. Mi babiladis angle kun la dekano s-ro A.Y. Bankav, kaj s-inoj Brigitta Ŝilina kaj Valentina Gurtaja, kiuj ambaŭ apartenas al la katedro de angla lingvo.

Ni interŝanĝis opiniojn pri la instrua metodo kaj la situacio de fremdlingva edukado en universitato. Ŝajnas al mi, ke la lingva nivelo de latvaj studentoj estas multe pli alta ol tiu de ordinarnaj japanaj studentoj. La profesoroj ne parolis Esperanton, sed montris sufiĉe grandan komprenon al la Internacia Lingvo kaj ĝiaj eblecoj.

Mia akompananto Talis poste veturigis min al la monumento de Salaspils 18 kilometrojn for de la urbo, kiu estas la „Aŭšvīc“ de Lat-

vio. En tiu malliberejo pereis 100 000 latvoj pro malsato kaj peza laboro. Mi havis profundan intereson kaj ĵuris labori, por ke oni ne permesu la militon refoje!

Post la tagmezo mi renkontis la vicprezidanton de la Societo supredirita, s-ro Eigmunds Sadauskis, kiu favore rilatas al Esperanto, kvankam li ne parolas ĝin. Ni babiladis ĉefe pri Japanio kaj japanaj, ĉar li vizitis la landon antaŭ nelonge.

Ankaŭ la sekvan tagon Janis gvidis min tra la urbo. Poste ni eniris en la Domo de Kulturo, kie jam atendis min, krom dekelkaj esperantistoj, grupo de pupa teatro. La aktoroj gajnis la duan premion dum la Internacia Pupa teatra Festivalo en urbo Zagreb, Jugoslavio. Oni montris al mi la pupojn (princino, sorĉistino, ktp.), kaj reprezentis parton de la premiita teatraĵo.

Poste mi havis intervjuon, en kiu mi parolis pri mia bona impresado de la urbo Riga kaj ĝia popolo. Responde al demandoj, mi klarigis la situacion de Esperantomovado en Japanio. Inter la aŭskultantoj estis kelkaj, kiuj jam konis la memorindan verkaron de Ludviko (s-ro ITO Kanzi) kaj MIYAMOTO Masao. Ni konsentis, ke la amikeco inter japanaj kaj sovetaj esperantistoj multe helpas la movadon por mondopaco kaj kontraŭ nuklea milito.

Nun, mi devis forlasi tiun belan urbon, kaj ĉe la stacidomo restis kun mi s-ro Kalmins, vicprezidanto de latva filio de ASE, ĝis la lasta momento.

William Ĝilbert: „Pri Landnomoj en Esperanto“, redaktis Nikola Aleksiev, 20×14 cm, p. 12, eld. Hungara Esperanto-Asocio, Budapeŝto, 1985.

La aŭtoro de tiu ĉi broŝuro estas konata fakulo pri la landnoma problemo en Esperanto. Dum pluraj jaroj li interesiĝis tre aktive kaj aperigis siajn konsiderojn en la Egazetaro. La nuna verko estas lia tuteca kontribuo al la solvo de la ardanta problemo. La nuna teksto estis fakte pretigita en 1983 kaj tiutempe aperis en la gazetaro. Tiu ĉi eldono celas plue vastigi lian koncepton inter la esperantistaro. La aŭtoro krom: elis atentigi kaj instigi la Akademion de Esperanto al decida kontraŭstao, al la kaoso en tiu sfero.

Ke tiu modesta laŭ sia amplekso verko estis tre efika, pri tio nin certigas la lastatempa decido de la Akademio de Esperanto („Esperanto“, organo de UEA, LXXIX, N-ro 963 (3), de marto 1986, p. 48).

Canko MURGIN

La Centro pri Turisma Reklamo, kunlabore kun la Turisma Sekcio ĉe Bulgara Esperantista Asocio, ĉiujare eldonas en Esperanto kelkajn faldfoliojn, broŝurojn k. a. Rezulte de tiu ĉi fruktodona kunlaborado estas ankaŭ la ĵus aperinta 16-paĝa broŝuro „Pri via feriado en Bulgario“. Presita sur bonkvalita papero, riĉe ilustrita per koloraj bildoj, ĝi abunde informas pri maraj kaj montaraj ripozejoj, pri historiaj lokoj kaj folkloro. Eldonkvanto: 20 000 ekzempleroj. Dank' al ĝi ĉiu leganto povas havi sufiĉe klaran bildon pri la ferieblecoj en Bulgario. Ĝi estas bona konsultato por personoj, kiuj planas vojaĝi kaj turismi tra la lando.

La esperantlingva versio de tiu ĉi broŝuro estus pli celkonforma kaj utila, se en ĝi oni povus trovi kelkajn adresojn necesajn al alilandaj esperantistoj, kiuj intencas viziti Bulgarijon: nome de la filioj de Internacia Esperanto-Kursejo en Pisanica kaj Varna, de montodomo „Esperanto“ apud Sofio, de magazenoj de Bulgara Esperanto-Kooperativo k. a.

Laŭ interkonsento ankaŭ tiu ĉi eldono de la Centro pri Turisma Reklamo estas disvastigata de la Turista Sekcio ĉe Bulgara Esperantista Asocio, P. K. 66, BG, 1090 — Sofio.

N. N.

Vilnius

Vespere la 28-an de aprilo mi atingis la stacidomon de Vilnius, la ĉefurbo de Litova Respubliko de Sovetunio. Tie sur la perono min salutis ĉirkaŭ 10 gesamideanoj, inter kiuj estis mia multjara leteramiko, s-ro Baltrus Venislovas.

Baltrus estas 71-jara pensiulo, ankoraŭ laboranta en hospitalo kiel oficisto. Li loĝas tre malproksime de Vilnius, kaj pro tio li veturis 200 kilometrojn perbuse nur por vidi min en la ĉefurbo. En la restoracio de la hotelo ni babiladis ĝis profunda nokto.

La sekvan tagon (la 29-an de aprilo), mi estis ege okupita. Matene mi havis tri vizitantojn. Ili estis: s-ro Skupas Algimantas, profesoro de franca lingvo kaj prezidanto de la Litova filio de ASE (Asocio de Sovetaj Esperantistoj) s-ino Stakaniene Nyole, kiu laboras en la Societo por Amikeco kun Fremdlando kaj s-ro Bajarunas Romualdas, kiu studas japanan lingvon kaj volas traduki la verkaron de modernaj japanaj verkistoj en litovan lingvon. Kvankam la lastaj du ne parolas Esperanton, ili tre simpatiis al ĝia idealo. Skupas kondukis min al la Litova Ŝtata Universitato, kiu situas en malnova monaĥejo, grandega kaj impona konstruaĵo, konsistanta el multaj labirintaj koridoroj. En la fakultato de fremdaj lingvoj mi diskutis kun profesoro Petras Anuas kaj aliaj en angla lingvo pri la stato de instruado de angla kaj aliaj lingvoj en Litovio kaj Japanio.

Nun aliĝis al ni s-ro Jegorovas Povilas, advokato profesie kaj vicprezidanto de Litova filio de ASE. Kune kun Skupas kaj Povilas mi longe promenis tra la urbo kaj vidis multe da antikvaĵoj, preĝejoj pordegoj, muroj de kastelo, katedra-

lo kaj aliaj. Post tagmango en subtera restoracio en la malnova katedralo, ni vizitis la oficejon de la Societo por Amikeco kaj Kulturaj Rilatoj kun Fremdaj Landoj. Tie kunvenis ĉirkaŭ 10 esperantistoj kaj aliaj kaj ni kune rigardis du filmojn: „Vivas la akvo“, kiu emfazis la gravecon protekti la naturmedion kaj „Savu la terglobo“, kiu alvokas al ni kontraŭstari nuklean armadon kaj militon. La filmoj estis ankaŭ plene esperantigitaj en facile kompreneblaj frazoj. De la prezidanto de la Societo, s-ro Vyataŭtas Marcinkevičius, mi ricevis saluton kaj memordonacon.

Poste min veturigis Skupas kaj Jegorovas per propra aŭto ĝis la „studenta vilaĝo“ ekster la urbo, kie oni havis „karnavalon“. La atmosfero similis al „studenta festo“, en japanaj universitatoj. Je la 6-a kaj duono vespere, mi adiaŭis miajn karajn akompanantojn ĉe la enirejo de la hotelo.

Baldaŭ venis Baltrus kaj mi ĝuis la lastan tempon en tiu bela urbo kun mia bonkora amiko, en la luksa bufedo de la hotelo.

La 30-an de aprilo mi rekte flugis al la urbo Kiev.

Kiev

Meztago de la sama tago mi alvenis al la flughaveno en Kiev. Post daŭro de renkontoj kaj ĉirkaŭrigardoj ĝis nun, mi, estis ege laca. Do, „felice“ por mi atendis min neniu ĉe la haveno! Mi rekte veturis al la hotelo „Dnipro“ en la centro de la urbo.

La sekvanta tago estis la 1-a de majo, kiu havas grandan signifon al Soveta popolo. Jam de malfrue sur la stratoj kolektiĝis amaso da homoj, kiuj atendis por rigardi la fest-paradon. Mi aliĝis al la amaso; estis ankaŭ grupo de japa-

naj turistoj, kaj mi havis ŝancon paroli en japana lingvo preskaŭ unuafoje post monato ekde mia forveturo el Japanio. Vere, la parado estis impresa. Ĝi komenciĝis ĝuste je la 10-a antaŭtagmeze kun solena sonorila anonco kaj finiĝis tagmeze kun majesta koruso kaj koncerto. Vicon post vico marŝadis diversaj grupoj reprezentantaj distriktojn, laborejojn, sportorondojn ktp. Oni portis sloganojn kiel ekzemple „Pacon al la Mondo“, „For atombombojn“, k. s.

La sekvan tagon, mi renkontis du esperantistojn, s-ron Miĥail Genin, kaj s-ron Pogorelij Slavka, kiuj gvidis min tra la urbo. Mi vidis grandegan panoramon de la rivero Dnepro, muzeon de Lenin, katedralon Sankta Sofia, ktp. Genin estas nun pensiulo, 67-jara, kiu antaŭe laboris kiel ĉef-inĝeniero por konstruo de elektra centralo, Slavka estas juna teknikisto en la kinematografio. Genin invitis min al sia hejmo, kie mi havis bongustan tagmangon preparitan de lia edzino.

Poste mi revenis al la hotelo, kaj trovis f-inon Svetlana Pogorelaja min atendanta. Ŝi estas fratino de Slavka, kaj instruas anglan lingvon en alternejo. Kune kun ŝi mi pasigis plezurajn tempon. Ni babiladis sidante sur la benko laŭlonge de la avenuo „Taras Ŝevĉenko“, fama poeto de Ukrainio. Svetlana akompanis min al la parko apud la rivero Dnepro, kie ni aŭskultis koncerton sub libera ĉielo.

Verdire, Kiev estas la verda urbo. Ĉie abundas arboj kaj herboj, precipe kaŝtanujoj, kaj la sezono estis ĵus por burĝonoj. Mi ne forgesos la tri tagojn, kiujn mi ĝuis en tiu be la antikva urbo.

(Daŭrigota)

INTERNACIA SCIENCA AKADEMIO COMENIUS

Fondiĝis la 12-an de aprilo en Kopenhago Internacia Scienca Akademio Comenius kun 28 membroj-fondintoj. El ili, 21 estas jam membroj de unu aŭ pluraj naciaj sciencaj akademioj kaj 7 estas aparte elstaraj sciencistoj. Ĉiuj estas uzantoj de Esperanto kaj la jenaj landoj estas reprezentitaj: Belgio, Britio, Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Ĉinio, Danio, Francio, FR Germanio, Hispanio, Italio, Japanio, Jugoslavio, Nederlando, Norvegio, Rumanio, Sovetio kaj Svedio.

PRAKTIKA UZADO

Akademio Comenius, kun maksimume 80 membroj, estas sendependa institucio, kiu celas:

— Iniciati, kuraĝigi kaj konsili pri efektivigo de sciencaj esplorprojektoj;

— Reprezenti la sciencistojn, kiuj uzas la Internacian Lingvon;

— Sekurigi kaj administri fondaĵojn por antaŭenigi sciencajn aktivadojn;

— Kunlabori kun aliaj organizaĵoj kaj akademioj, ekzemple la Esperanto-Asocio Teknika-Sciencista (Ĉina Akademio de Sciencoj) kaj la Akademio Internacia de la Sciencoj (San-Marino), kiu arigis pli ol 200 sciencistojn el multaj landoj.

Gia unua tasko estas publikigo de la jarlibro „Aktoj de Akademio Comenius“ kun regularo, adresaro de la membroj, raportoj en

Esperanto (kun nacilingvaj resumoj) de la Akademianoj kaj de alte kompetentaj fakuloj.

GRAVA PROBLEMO

La financado estas la plej tikla problemoj. Ĝian bazon formas la kapitalo, la ĉiujaraj enspezoj kaj la fondaĵoj. La kapitalo de Akademio Comenius konsistas el heredaĵo kaj kontribuoj de minimume 10 000 svisaj frankoj, aŭ ekvivalentoj donacitaj de institucioj aŭ individuaj mecenatoj. La enspezo konsistas el interezoj de la investita kapitalo kaj el regulaj kontribuoj (minimume 100 svisaj frankoj).

La sukceso kaj ekfunkciigo de la Akademio dependas unuavice de la akcepto kaj helpo de esperantistaj individuoj kaj organizaĵoj.

JAM EN JANUARO

La provizora estraro de Akademio Comenius konsistas el prezidanto: Prof. d-ro P. Neergaard vic-prezidantoj: Prof. d-ro S. Guĝev kaj prof. d-ro Ivo Lapenna, ĝenerala sekretario: Prof. d-ro C. O. Kiselman, kasisto: Prof. d-ro P. E. Kustaanheimo, ceteraj membroj: Prof. d-ro S. Nisbet kaj Prof. d-ro O. Reiersöl.

La jura sidejo estos en Uppsala (Svedio) kaj la regulaj elektoj okazos, konforme al la regularo, tuj post la 1-a de januaro 1987.

P. NEERGAARD

(El „Heroldo de Esperanto“, n-ro 9, 5. 7. 86)

POR VIA LINGVA PERFEKTIGO

Karaj legantoj,

Nun ni restarigas rubrikon tre necesan, en kiu ni donos lokon al teoriaj artikoloj verkitaj de spertaj lingvistoj, sed eble, pli ofte — al praktikaj problemoj de la lingvouzo. Ni respondos ankaŭ al lingvaj demandoj de vi mem starigitaj.

Ci-sube legu pri novaĵoj el la Akademio de Esperanto.

En la *Gramatika Sekcio* oni diskutis lastatempe la proponon pri oficialigo de la prepozicio *Far*, kiun iuj esperantistoj uzas, kvankam ĝis nun ĝi ne ricevis aprobon. Samtempe oni prikonsideris kelkajn aliajn proponojn, ekzemple: *far' de*, *flanke de*, *fare de*. Neniu el la akademianoj opinias, ke „*far' de*“ estas taŭga. Aliflanke laŭ 24 akademianoj taŭga estas „*fare de*“, 8 el ili opinias, ke ĝi estas la plej taŭga el inter la prezentitaj proponoj.

La subtenon de 16 akademianoj ricevis „*flanke de*“ (cetere ĝi estas Zamenhofa!), nur 11 akademianoj subtenis „*far*“. Mi aldonu, ke 13 akademianoj opinias, ke „*far*“ estas netaŭga kaj eĉ laŭ 12 akademianoj ĝi estas malrekomendinda.

La unua voĉdonado pri „*far*“ tute klare montas, ke denove ĉi tiu propono ne trovas la akademian aprobon. Dume en kelkaj revuoj oni plue trudas al la legantoj „*far*“. Oni havas impreson, ke kelkaj aŭtoroj per la uzo de „*far*“ volas esti „modernaj“, dume — tre ofte en la sama teksto de la koncerna aŭtoro troviĝas elementaj lingvaj eraroj. Konkludo? Unue oni ellernu la lingvo-bazon, oni uzu la lingvon korekte kaj poste oni proponu plibonigojn. Cetere, se tiu aŭ tiu aŭtoro havas nenion por diri, la uzo de „*far*“ neniel helpas lin/ŝin.

A. PETTYN

(„Pola Esperantisto“, n-ro 1/1986)



Iam 31 jarojn estas organizata Internacia Danuba Remado (IDR). Tiu ĉi arango daŭras du monatojn kaj oni remas pli ol 2000 km — de FGR ĝis Bulgario. Nur unuopuloj havas kuraĝon, tempon kaj fortojn por partopreni la tutan IDR-on.

Ĉi-jare la bulgaran parton de IDR, de urbo Vidin ĝis urbo Silistra, longa 421 km, partoprenis 250 diversajaj personoj el FGR, ĈSSR, Hungario, Pollando kaj Jugoslavio, Aŭstrio, Usono, Izraelo kaj Nederlando. Kune kun la centoj da bulgaroj dum du semajnoj en aŭgusto ili lerte gvidis siajn boatojn laŭ la fluo de la granda rivero. Inter ili estis ankaŭ la grupo „Esperanto“ konsistanta el 77 gebulgaroj. Aliĝis ankaŭ hungara samideano-veterano Kovacs, kiu jam dek fojojn partoprenas IDR-on. La esperantista grupo estis unue la plej bone organizitaj, disciplinita kaj aktiva. En ĝi partoprenis ankaŭ la juna entuziasma esperantisto, la kuracisto Cvetoljub Kunčev. Li gvidis Esperanto-kurson en urbo Levski por la partoprenantoj en la remado. Ekscitante, ke en nia grupo estas kuracisto, la gvidantoj de IDR petis, ke li estu nomita „kuracisto de IDR“. Tiu honorigo donis al li eblecon, scipovante kvar lingvojn, alparoli siajn pacientojn pri Esperanto. Krome, sur lia tendo, super la ruĝa kruco, estis ankaŭ la verda stelo.

Niaj kvar tendoj, ĉiutage konstruataj post la remado en la mezo de la tendarego, surhavis tolajn sloganojn: „Esperanto — dua lingvo por ĉiu homo“, „Ekonu la mondon per Esperanto“ kaj „Esperanto lingvo internacia“. Multaj flugfolioj kaj la alvoko de Bulgaraj Turista kaj Esperantista Asocioj, en lingvoj bulgara, germana kaj hungara, instigantaj la remantojn lerni Esperanton, estis disdonitaj. Granda nom-

bro da personoj petis pli da informoj pri la lingvo kaj la movado.

Tre forte impresis la partoprenantojn en IDR nia renkontigo kun geesperantistoj el urboj Levski, Pleven kaj Nikopol. Ili miris pri la bona etoso kaj la varia programo el kantoj, versaĵoj, anekdotoj kaj ludoj. Deko da personoj promesis lerni la lingvon por povi venontjare aliĝi al nia grupo.

La Turista Sekcio ĉe Bulgara Esperantista Asocio planas la partoprenon en IDR-87 de internacia grupo „Esperanto“. Ni esperu, ke ni rikoltos ankoraŭ pli grandajn sukcesojn, ĉar tiam organizanto de la tuta IDR estos Bulgara Turista Asocio. Ties gvidantoj subtenas nian aktivadon kaj helpas nin en nia laboro disvastigo kaj praktikado de Esperanto en turismo. . .

Jam komenciĝis la preparlaboroj por partopreno de internacia esperantista grupo en la bulgara parto de IDR. Ĝia efektivigo estos grava kontribuo de la turistoj-esperantistoj al la 100-jariĝo de Esperanto.

Por pliaj informoj turnu vin al: Danuba Remado, PK 45, BG, 1090 — Sofio.

Nikola NIKOLOV

RENKONTIGO KUN PARTOPRENANTOJ EN IDR'86

Reprezentantoj de la E-organizaĵoj en Pleven-distrikto, ĉe-kape kun Vâlka Dobrev — prezidantino de DE de BEA — Pleven, kaj Stanka Toševa — prezidantino de E-societo „Trumpetisto“ en urbo Levski, havis renkontigon kun la bulgaraj esperantistoj-partoprenantoj en IDR'86, okazintan la 24-an de aŭgusto ĉi-jare sur la Danuba bordo apud urbo Nikopol. En intima amika etoso Nikola Nikolov, vic-prezidanto de „Monda Turismo“, rakontis pri la partopreno de bulgaraj esperantistoj en la Remado. V. Dobrev kaj S. Toševa donacis al la partoprenantoj en IDR'86 memoraĵojn.

Jorĵeta DIMITROVA-KAMENOPOLSKA, Pleven

El nia leterkesto

„MI JAM ESTAS ESPERANTISTO!“

Karaj amikoj,

En aprilo kaj majo de la nuna jaro mi estis en Pomorie ĉe la Nigra Maro, por kuracado. Mi estas tre dankema pro la bonaj zorgoj, ĉefe pro la medicina prizorgado. Mi estis tre feliĉa en Bulgario kaj tiu restado estis por mi granda travivaĵo.

Same bona travivaĵo estis por mi la konatiĝo kun bulgaraj esperantistoj. Esperanton mi eklernis en septembro pasintjare. Kontaktojn kun bulgaraj esperantistoj mi serĉis en Pomorie kaj Burgas. Helpis al mi ĉefe s-rinoj Alis Konstantinova el Pomorie kaj Elena Stojkova el Burgas. En Pomorie okazis renkontigo kun la urbaj esperantistoj. Tiel mi konatiĝis kun bulgaraj esperantistoj, kiujn mi ofte renkontis kaj kiujn mi vizitis hejme. Ekestis amikeco. Mi estas tre dankema pro la travivaĵo, kiu eblis dank' al Esperanto.

La ceteraj alilandaj pacientoj enviis min, ĉar mi povis rekte interparoli kun bulgaraj homoj kaj ili iom ekinteresiĝis pri Esperanto. Mi devas ankoraŭ multe lerni Esperanton, sed en Bulgario mi unuafoje povis diri pri mi, ke jam mi estas esperantisto.

Peter SCHMITZ,
Halle-Neustadt, GDR

AMIKA LETERO

Karaj geamikoj,

Post longa tempo fine mi povas skribi al vi ĉiuj, kiujn mi renkontis dum la „Sciencpraktika Konferenco en 1982 en Bulgario. Tiam mi vizitis Sofion, Veliko Tŕrnovo, Polski Trŕmbeŝ, Gabrovo, Plovdiv kaj aliajn viajn urbojn.

Neforgesebla estas por mi via gastamo ĉie, kie ajn mi restadis. Neforgesebla estas via bela lando. Guste tiam mi konvinkigis, ke ĉiu homo havas rajton al paca ekzistado, ĝojo kaj laboro.

Kiam mi estis unuafoje en via lando dum UK de Esperanto en Varna 1978, mi interesiĝis pri la sociala demando kaj post mia dua restado en 1982 mi spertis maturigon ĉi-riate, kio kondukis min al mia kompartianiĝo en mia lando. Ĉiu tago ree konfirmas mian decidon, elektinte la historian vojon. Klare iĝis al mi: nur senarmigita mondo permesas kreskadon de la interpopola kompreniĝo; nur en senarmigita paco ekfloros la interpopola kulturo, ne laste de nia komuna internacia lingvo Esperanto.

Laiokaze mi rekomendas al ĉiuj konatuloj vian gastaman landon por viziti ĝin ferie, por ke niaj homoj ĉi-tie propraokule konvinku pri tiuj valoradoj.

Esperante, ke mi iam denove sukcesos viziti Bulgarijon, mi salutas sincere kaj pacamike via:

Roland H. HEGEN — publicisto,
FR Germanio

„NEFORGESEBLA RESTADO EN SOFIO!...“

(Interparolo kun ĉina esperantistino)

La 4-9.6.86 en Sofio okazis la XVII Internacia Foiro de la Libro. Ĝi estas multjara tradicio, kiun partoprenas pluraj eksterlandaj librofirmaoj. Por unua fojo ĉi-jare la Foiro estis aranĝita en la Palaco de Kulturo „Ljudmila Jivkova“, kio donis apartan majestecon al tiu grava internacia kultura evento. Miloĵ da libroŝatantoj vizitis la Foiiron dum tiuj kvin tagoj. Ĝi allogis ankaŭ multajn esperantistojn, ĉar ĉi-jare unuafoje estis organizita Esperanto-stando.

Evidentiĝis tamen, ke ankaŭ la Internacia Librokomerca Entrepreno de Ĉinio prezentis E-librojn. Kaptis la atenton de sofiaj esperantistoj ilia bone aranĝita stando de infana E-literaturo.

Dum mi trarigardis la interesajn, plaĉe ilustritajn librotojn, mi konatiĝis kun la ĉina esperantistino s-ino Si Guibau (Si Kiu-baŭ). Jen parto de nia interparolo.

— *Sinjorino, Si, bonvolu rakonti iom pri vi mem.*

— Esperanton mi lernis en universitato antaŭ 20 jaroj. Mi havas feliĉan familion, tri filojn. Mi ŝatas legi librojn, spektifilmojn.

— *Ĉu vi okupiĝas profesie pri Esperanto?*

— Nun mi laboras en Internacia Librokomerca Entrepreno de Ĉinio. Iam mi okupiĝis profesie pri Esperanto, laborante en la E-sekcio de nia entrepreno.

— *Ĉu en via nuna profesio vi havas eblecon apliki Esperanton?*

— Bedaŭrinde ne. Nun mi havas malmultajn okazojn praktiki kaj paroli la lingvon. Nur kiam esperantistoj vizitas nian entreprenon aŭ ni gastas ie.

— *Viaj impresoj pri nia E-stando?*

— Tie mi trovis multajn interesajn librojn.

— *Via opinio pri nia lando kaj pri la bulgaraj esperantistoj?*

— Mi scias, ke la esperantistoj en via lando faras multon por la progreso de la E-movado. Kvankam mi ne venis speciale por Esperanto, mi havis okazon renkontiĝi kun esperantistoj, multe paroli kun ili. Ĉiuj estas afablaj kaj ĝentilaj. Tio faris al mi profundan impreson. Mi certe rakontos en Pekino pri mia neforgebla restado en Sofio.

Veneta BALEVA

SCIENCA SIMPOZIO

Fine de julio j.k. la Ĉina Akademio de Sciencoj (CAS) kaj la Esperantista Scienc-Teknika Asocio, aganta sub ties aŭspicio, organizis en Pekino Internacian Sciencon Simpozion en Esperanto.

En ĉesto de ĉ. 500 scienculoj, s-ro Yan Donsheng, vicprezidanto de CAS, malfermis la Simpozion. Per sia ĉesto honoris la solenaĵon s-ro Huan Hua, vicprezidanto de la Parlamento. Salutante en Esperanto, li emfazis, ke „En la longa historio de Esperanto-movado la enkonduko de Esperanto en la sferon de scienco estas pionira laboro. La hodiaŭa simpozio estas grava paŝo tiudirekten.“

Sekvis salutoj de s-ro Chen Yuan, vicprezidanto de la 71-a UK, kaj de reprezentanto el Hungario, Francio, FR Germanio, PR Kongo, Japanio, Usono, Tanzanio, Togo k. a.

Ricevitaj estis ankaŭ salut-telegramoj kaj leteroj, inter kiuj la letero de s-ro Lu Yixi, prezidanto de CAS, de s-ro Yu Guangyuan, konsilanto ĉe CAS, k.a.

La laboron de la Simpozio, dividitan en ses sekciojn, partoprenis 296 sciencistoj el 15 landoj. Nombro de disertaĵoj — 104.

La bulgara reprezentanto, aŭtoro de tiu ĉi informo, prelegis pri temo „De la surrokaj desegnaĵoj ĝis la modernaj alfabetoj“. La preleĝo estis ilustrita per 46 lumbildoj.

Kiril DRAJEV

GRATULOJN!

Nia regula kunlaboranto Dimităr Georgiev Kamenopolski — prezidanto de la Kontrola Komisiono de DE de BEA kaj ĉefkontisto de la distrikta ekonomia entrepreno „Globus“ — Pleven, pro lia partopreno kiel volontulo en la Patrolanda Milito 1944—1945 estas distingita per la medalo „40 jarojn de la venko super hitler-faŝismo“.

Sincerajn gratulojn kaj bondezirojn pri sano kaj plua aktiva agado sur la Esperanto-kampol

La redakcio de „BE“

VOJAĜANTA LEKTORO

D-ro Hans Eichhorn (GDR), studinte en Sofio kaj scipovante la bulgaran lingvon, en 1987, tuj post la UK aŭtomobile rondvojaĝos tra Bulgario kaj proponas al E-societoj kaj kluboj prelegojn pri sia fako (psikoterapio kaj psikiatrio) kaj pri GDR. Mi preferas vilaĝojn kaj urbetojn kaj petas pri invitoj por plani la rondvojaĝon. Sola kondiĉo estas modesta tranoktado antaŭ kaj post la preleĝo por du plenkreskuloj kaj du infanoj. Bonvolu skribi al: D-ro Hans Eichhorn, Robert Koch-Str. 1, DDR — 2120 Ueckermünde, Reciproka vizito en GDR laŭ interkonsento eblas.

ESPERANTO-TAGOJ

„Pli da tiaj en Esperantio!“ — diris Maurice Merger, franco, kiu aktive partoprenis la Esperanto-tagojn en Sofio.

Tiun kvartagan aranĝon (17-20.07.1986) partoprenis ĉirkaŭ 300 personoj. Venis gastoj el 15 bulgaraj urboj kaj vilaĝoj, el Hungario, Finnlando, Jugoslavio, Francio kaj Svedio. La Esperanto-tagoj en Sofio okazis por unua fojo. La organizantoj: Sofia Esperanto-Organizaĵo, Sofia Subdistrikta Turista Societo „Cerni Vrah“, la Bulgara Sekcio de Asocio „Monda Turismo“ kaj la Turista Klubo „Esperanto“ multe klopodis kaj preparis bonegan kaj modelan aranĝon, per kiu ili celis ebligi al la partoprenantoj intense praktiki Esperanton, ekkoni la vidindaĵojn de la bulgara ĉefurbo, larĝe propagandi ĝin.

La partoprenantoj en la Esperanto-tagoj vizitis la Nacian Historian Muzeon, la Natur-Scienca Muzeon, la Artgalerion de la fondaĵo „L. Jivkova“ kaj la maŭzoleon de „G. Dimitrov“. En la templo-monumento „Al. Nevski“ oni trarigardis belajn freskojn kaj ikonojn. Veneta Baleva kaj Nikola Nikolov kompetente ĉiĉeronis kaj respondis al demandoj.

La promenado apud la baraĵlago en Panĉarevo kaj per ŝipeto vere ravis ĉiujn.

Sabate vespere ni estis invititaj al ne anoncita en la programo iniciato. Membroj de la tramista societo „Verda Tramo“ senpage promenigis la partoprenantojn tra Sofio — per tramo ornamita per sloganoj, afiŝoj kaj flagetoj. Nia ĉiĉerono dum la vojaĝo estis Lasto Nikov, prezidanto de la societo.

Kulmino de la Tagoj estis la lasta kaj plej amase vizitita aranĝo — la festo de montodomo „Esperanto“.

La montodomo kaj ties ĉirkaŭaĵo estis Esperante „vestitaj“. Sloganoj en bulgara lingvo kaj en Esperanto, verdaj flagetoj altiris la atenton de la turistoj.

Nikola Nikolov, unu el la iniciatintoj por konstruado de la montodomo, parolis pri ĝia ĝisnuna historio. Lia propono — ke sofiaj turistoj-esperantistoj, lige kun la centjarigo de Esperanto, konstruu fontoŝtonon ĉe la panorama aleo, kiu kondukas de la montodomo al hotelo-restoracio „Kopitoto“, estis entuziasme

akceptita kaj aplaŭdita. Oni planas inaŭguri la konstruotan fontoŝtonon dum la Esperanto-Tagoj en Sofio, okazontaj la 17-an-20-an de septembro 1987.

Artistoj kaj amatoroj plenumis belartan programon. La kvizon „Kion vi scias pri Esperanto kaj pri E-turismo?“ partoprenis multe da ĉeestantoj. Por trafaj respondoj oni ricevis premiojn.

Viglan intereson vekis la ekspozicioj de Georgi Litov (letero kaj poŝtkartoj) kaj de Karamfilka Adamova. Multaj ĉeestantoj trarigardis la 12 panelojn de s-no Litov, kiujn li pendigis sur la montodoma muro, sub libera ĉielo. K. Adamova ekspoziciis pupojn en multkoloraj bulgaraj popolkostumoj. Estis reprezentitaj vestaĵoj el 15 regionoj de Bulgario.

„La Esperanto-Tagoj en Sofio estis belega kaj interesa aranĝo. Kun plezuro oni partoprenas tiajn iniciatojn“. Tiujn vortojn diris Anna Besenyei el Budapeŝto. Verŝajne ili ne estas nur esprimo de ĝentileco, ĉar mi eksciis, ke multaj sofiaj geesperantistoj, kiuj ne povis partopreni, esprimis sian bedaŭron. Ni povas konsoli ilin nur per invito partopreni la Esperanto-Tagojn en Sofio en 1987.

Lige kun la Tagoj estis eldonitaj 200 ilustritaj afiŝoj. La programo de la aranĝo aperis en eldonkvanto de 500 ekz.

La vicedirektoro de la Natur-Scienca Muzeo promesis, ke ĉe reeldono de la broŝuro pri la muzeo en ĝi estos ankaŭ teksto en Esperanto.

Provizora klariga teksto en Esperanto estis ĉe la enirejo de la katedralo „Al. Nevski“.

Jurnaloj „Oteĉestven Front“ (300 mil ekz.) kaj „Eŝio“ (50 mil ekz.) aperigis detalajn informojn pri la aranĝo. Tion faris ankaŭ Bulgara Radio, kaj Bulgara Televido, la 20-an de julio k. j., en sia vespera emisio pri enlandaj kaj eksterlandaj novaĵoj elsendis informon-enketon pri Esperanto, Bulgara Esperanto-Asocio kaj la Esperanto-Tagoj.

Dum la Tagoj estis disdonitaj 600 speciale presitaj flugfolioj pri Esperanto.

Al anoncita Esperanto-kurso por turistoj esprimis deziron aliĝi 26 personoj.

N. IVANOV

INTERNACIA SOMERA TENDARO

En la bela distrikta urbo Potsdam, proksime de la GDR-ĉefurbo Berlino, de la 23-a ĝis la 30-a de aŭgusto 1986 okazis renkontiĝo de esperantistoj.

Partoprenis 70 geesperantistoj el kvin landoj — Bulgario, Ĉeĥoslovakio, GDR, Hungario kaj Pollando. Interesa estis la ekskurso tra Berlino, la promenadoj en la parko de la palaco Sanssouci. Ni vizitis ankaŭ la kastelon

Cecilienhof, kie en 1945 okazis la historia Potsdama Konferenco.

Interkona vespero, prelegoj kun lumbildoj, amuza vespero kaj interesa ekspozicio, amikaj babiladoj okupis la horojn post la agrablaj tuttagaj ekskursoj. Rapide pasis unu semajno, kiu lasis ĉe ni bonajn impresojn de la renkontiĝoj kun multaj novaj amikoj.

Olga GERASIMOVA,
Ŝumen

LITERATURAJ RONDOJ AKTIVAS

La 11-an de junio 1986 la festa salono en la Centra Domo de Instruisto en Sofio estis tre malvasta por akcepti ĉiujn, kiuj deziris ĉeesti la Duan Renkontigon de la literaturaj rondoj ĉe Sofia Esperanto-Domo de Kulturo (SEDK) kaj ĉe la Arta Klubo en Plovdiv pri temo „Intima liriko en la verkaro de la artklubanoj“. Georgi Mihalkov, gvidanto de la sofia Literatura Rondo, salutis la gastojn. En la komuna programo unue sin prezentis la gastoj. En daŭro de pli ol unu horo siajn verkojn prezentis A. Krumov — prezidanto de la Plovdiva klubo, E. Aristodulova — sekretariino de la sama klubo, L. Sotirova — instruistino de franca lingvo el Plovdiv k. a. K. Petrova prezentis verkojn de la forpasinta Sinka Filaretova el Asenovgrad kaj V. Kurteva — prezidantino de la plovdiva E-societo „Kulturo“, plenumis verkojn de Nadija Andrianova el Ukrainio, kiu estas membro de la klubo, kaj tradukitan de ŝi mem bulgaran popolkanton. Eva Bojaĝieva deklamis sian versaĵon kaj kantis francan kanton, kies tekstojn ŝi esperantigis. La ĉeestantoj plezure ĝuis melodiojn de amkantoj, kiujn plenumis D. Danev per buŝharmoniko. La afablaj dommastroj donacis al ĉiu gasto interesajn E-librojn. La E-veterano Ivan Sivarov el Plovdiv sendis donace librojn al la sofia Literatura Rondo.

Tre bonan impreson faris la sukcesa partopreno de junaj esperantistoj el Sofio, el 8-a ESPU.

Fine salutparolis sinjorino Ŝi Guibao el Pekino. Si esprimis sian ĝojon esti interbulgaraj esperantistoj kaj bondeziris pluajn sukcesojn al la amatoraj verkistoj kaj poetoj.

La vespero pasis en agrabla amika etoso.

Eva BOJAĜIEVA
Bojidar ALEKSIEV

NOVAJOJ EL RUSE

85-JARA JUBILEULO SEN BASTONO KAJ OKULVITROJ

La regula semajna kunveno de esperantistoj-aktivuloj en la urba Esperanto-klubo en Ruse pasis en emocia jubilea etoso.

Oni solene celebris la 85-an naskiĝtagon de la plej fidela esperantisto-veterano, la Esperanto-poeto Boris Petrov Kavalĝiev.

Kortuŝajn vortojn pri la kara jubileulo eldiris la prezidanto de la urba societo „Libero“ Nadejda Sirkova. Oni enmanigis al li bukedojn el ruĝaj diantoj, esprimo de sincera estimo de la esperantistaro en Ruse.

La jubileulo tralegis sian novan versaĵon dediĉitan al lia 85-jara vivovojo kaj 65-jara Esperanto-agado, kantis sian amatan Esperanto-kanton kun akompano de mandolino. La edzino de la jubileulo regalis la ĉeestantojn kun bondeziro, ke ili ĉiuj ĉeestu la 90-an jubileon de la Esperanto-dojeno en Ruse.

Dum la sama kunveno oni anoncis pri la 80-a naskiĝtago de alia Esperanto-veterano, la fidela kaj sindona esperantisto d-ro Vasil Todorov Vasilev, aktiva batalanto kontraŭ faŝismo kaj kapitalismo, kooperativano kaj sobrolo.

Ankaŭ al li la kunveno direktis varmajn jubileajn salutojn.

EMOCIA PACKUNVENO

La kunveno de la E-aktivularo en Ruse, okazinta la 2-an de septembro j. k. en la urba Esperanto-klubo, estis dediĉita al la Tutmonda Sindikata Tago de la Paco. Kara gasto de la esperantistoj estis la prezi-

danto de la distrikta pacdefenda komitato, la distrikta korespondanto de ĵurnalo „Oteĉestven Front“, merita aganto de la kulturo kaj sincera amiko de Esperanto Mihail Keremidĉiev.

La ĉeestantoj-aktivuloj emociite aŭskultis la raporton de M. Keremidĉiev pri la akra bezono de senĉesa batalado kontraŭ la vetarmado, por plena senarmigo, por konservo de la homa vivo. La E-poeto-veterano Boris Kavalĝiev deklamis sian porpacan versaĵon, d-rino Makaveeva en la nomo de la medicinista E-societo „D-ro Zamenhof“ deklaris senrezervan apogon de la esperantistoj-medicinistoj por la paco. Jordan Kalinov, korespondanto de „Bulgara Esperantisto“, faris proponon varme akceptitan de la kunveno: laŭ la sperto de esperantistoj el V. Tarnovo kaj Ŝumen, DE de BEA en Ruse kontrakte ligu per Esperanto la Distriktan Komitaton por Defendo de la Paco — Ruse, kun similaj distriktaj komitatoj en la ĝemeligitaj kun Ruse urboj el socialismaj kaj kapitalismaj landoj.

TAGOJ DE ESPERANTO

La centjara jubileo de Esperanto startis la 26-an de julio 1986 en la 71-a Universala Esperanto-kongreso, en la salonego de la Pekina Ĉina Teatro en ĉeesto de 2500 kongresanoj el 50 landoj, inter kiuj tri esperantistinoj el Ruse. En Ruse estas preparata Organiza Jubilea Komitato kun reprezentantoj de amasaj sociaj organizaĵoj. Aprobataj de la Distrikta Konsilantaro pri Intelektala Disvolvigo kun prezidantino Maria Nankova, vicprezidantino de la Plenumkomitato de Distrikta Popola Konsilantaro, estas antaŭviditaj diversaj aranĝoj inter kiuj:

— Tagoj de Esperanto en la urbo kaj distrikto (16-a—18-a.V.1987).

Dum la Tagoj oni okazigos solenajn kunvenojn, ekspoziciojn, filmprojekciojn, k.a. Oni invitos tiucele gastojn-esperantistojn el la ĝemaj kun Ruse eksterlandaj urboj.

— Renovigo de aranĝita dum 1966 okaze de la 1-a Monda Studenta Esperantista Kongreso „Aleo Esperanto“ en la urba Junulara Parko, pri kio zorgas d-ro Vasil Vasilev, esperantisto-aktivulo.

— Fondo de fakaj Esperanto-societoj: instruista societo „Vela/Piskova“, medicinista societo „D-ro L. Zamenhof“, kaj ĉe iuj uzinoj.

— Fondo de Distrikta Ĵurnalista Esperanto-Klubo (DJEK) „Aristo Botev“, celanta instigi ĵurnalistojn lerni Esperanton, provizi amaskomunikilojn per pri-esperantaj korespondaĵoj kaj prepari per la helpo de la nacia TEJA-sekcio — Sofio, en bulgara lingvo, en amasa eldonkvanto „Rusenski Jubileen List — 100 godini esperanto“.

— Eldono de jubilea libro-albumo de Esperanto-aktivuloj el la distrikto, preparo de listo de la mortintaj aktivuloj de la komenco de organizita loka Esperanto-movado en 1900 kun literaturaj skizoj de Dimitar Ivanov, Sava Ivanov, Simeon Baltaĝiev kaj Dimitar Novakov el vilaĝo Batiŝnica, postlasintaj spuron en la historio de la Esperanto-movado en Ruse kaj la distrikto. Daŭre venas novaj ideoj kaj proponoj por digna celebrado de la ĝlora jubileo.

DISTRIKTA PLENKUNSIDO

En Ruse okazis plenkunsido de la Distrikta Estraro de BEA. Raporton faris ties prezidanto Georgi Dobrev. Estis faritaj ŝanĝoj en la konsisto de la Distrikta Estraro kaj estis traktitaj taskoj, ligitaj kun la celebrado de la centjariĝo de Esperanto. La plenkunsido okazis en la eksterurba turista restoracio-hotelo „Prista“. Estis organizita ankaŭ ekskurso per aŭtobuso al la mezepoka kastelo Cerven, vizito de la tre interesa dua laŭ grandeco en la lando groto „Orlova Ĉuka“ apud vilaĝo Pepelina.

Jordan KALINOV



BULGARIO

Helena Beinova (23-jara studentino) — Sofio 1527, ul. „Catalga“ 25 — pri literaturo, muziko, fremdaj lingvoj.

Donka Ivanovska — 5700 Teteven, distr. Loveč, str. „Lečo Gajdarja“ 11 — pri matematiko, sporto, muziko, poezio.

Ivan Nikolov (50-jara instruisto de fremdaj lingvoj) — Poveljanovo, distr. Varna, str. „Ukrajna“ 2, bl. 1, vh. B, ap. 21 — serĉas amikan korespondadon tutmonde.

Gekursanoj el urbo Sumen dez. kor. tutmonde: Katja Haĝieva — studentino, Pavlina Djakova — instruistino, Emilija Georgieva — studentino, Stojĉo Veliĉkov — laboristo. Ilia komuna adreso: Sumen 9700, P. K. 5.

Bela Isaeva (15-jara) — Sumen 9700, ul. „Kitka“ 2, vh. 4, et. 2, ap. 75 — pri futbalo, muziko.

HISPANIO

José Maria Rodríguez Felgueres (32-jara poŝtoficisto), Avda. Fdez. Ladreda № 102—120 C, 33207 Gijón (Asturias) — kolektas BK kaj PM. Dez. kor. kun ĉi pri naturo, filmoj, muziko, komputiloj, kaj nuna vivado.

POLLANDO

Alicja Strzelecka (25-jara studentino) — P-60-391 Poznań, str. Swoboda 26/1 — pri turismo, filmoj, literaturo kaj arto.

Geedzoj Małgorzata kaj Sławomir Michon (27-jara instruistino kaj 28-jara inĝeniero) — PL-19300 Elk. ul. Słowackiego 22/6 — kun la tuta mondo, pri ĉiuj temoj.

Antoni Myszakowski (42-jara juĝisto) — PL-56-400 Olesnica, skr. poczt. 26 — pri juro kaj aliaj temoj: dez. interŝanĝi PM, BK, E-librojn.

Izabela Cieluch (23-jara instruistino) — PL- 57-350 Kudowa-Zdr. ul. Swierczewskiego 3/1 — pri literaturo, turismo; kolektas BK, PM.

RUMANIO

18—28-jaraĝaj rumanaj ĝejunuloj, anoj de la esperantista turisma kaj alpinisma rondo „ESEMONT“, dez.kor.tutmonde pri diversaj temoj, precipe pri turismo kaj reciprokaj vizitoj:

F-ino Gheorghe Constantina Cristina — str. Nera 2, bl. OD 5, sc. E, et. 9, ap. 199, Sektor 6, RO-77389, Bucuresti 66.

S-ro Gogoase Eugen — Alea Barajul Dunarii 9, bl. Z 10, S-2, ap. 18, Sektor 3, RO-74618, Bucuresti 57.

F-ino Meret Elena — Bd. Metalurgiei 20, Bl. A 15, S-1, et. 10, ap. 44, Sektor 4, RO-75576, Bucuresti 61.

GEORGI MIHALKOV. KIK'86 — altnivela, suk-

cesa

DONČO HITROV. Trafe informadi pri Esperanto

DIMITAR VESELINOV. KIK-anoj pri KIK

ARPAĎ RÁTKAI. Starto de nia movado — 1879

CANKO MURGIN. Historia optimismo de la bulgara E-movado (1936—1944)

NEDKA VALJAVICARSKA. Elstara publicisto kaj esperantisto

MARIN NANOV. „Foto Esperanto“

JOZEF MĀDĀRAS. HEJ—hierau kaj morgau

VLADIMIR JELEV. Laborbrigado en Karlovo

CANKO MURGIN. Hardiĝo de ĵurnalisto kaj redaktoro. Ege utila broŝuro

NIKOLA NIKOLOV. Bela turisma eldonaĵo

YOSHIAKI MIZUNO. Raporto el eŭropa Esperantujo

PAUL NEERGAARD. Internacia scienca akademio Comenius

NIKOLA NIKOLOV. IDR'86

VENETA BALEVA. „Neforgesebla restado en Sofio“

NIKOLA NIKOLOV. Esperanto-tagoj

ENLANDA MOVADO. Literaturaj rondoj aktivis.

Novajoj

DEZIRAS KORESPONDI

DISTROJ

Sur la unua kovrilpaĝo:

Partoprenintoj en la ĉi-jara Kvara Konstanta Internacia Kvalifikejo.

Foto: Petko ARNAUDOV

SOVETUNIO

Ruta Vaičiunaite (21-jara studentino pri zoologio) — SU-232005 Vilnius, str. Eidukevičiaus 44a-28 — kun bulgaraj geamikoj.

Valex Bujak (29-jara instruisto pri karateo kaj jogo) — SU-220050 Minsk, Postamt, Boc.27 — pri karateo, jogo; kolektas BK, PM, esperantaĵojn, librojn, kalendaretojn.

Vilhelmas Ĉiapas (25-jara farmaciisto) — SU-235000 Jonava, Ralio 6 — I Litovio — pri literaturo, sporto; kolektas BK, kalendaretojn.

NI KONDOLENCAS

La 20-an de aŭgusto j. k. en Asenovgrad subite forpasis en sia 68-jara aĝo la multjara sekretario de la loka esperantista societo „David Sasonov“ Deŝka Nikolova Kaŝarova, membro de DE de BEA en Plovdiv kaj sperta kursgvidantino.

Kun ŝia morto nia societo perdis unu el siaj plej elstaraj, agemaj kaj sindonaj membroj.

La esperantistoj el Asenovgrad kun doloro en la koroj kliniĝas antaŭ la memoro de Deŝka Kaŝarova.

E-societo „D. SASONOV“, Asenovgrad

Ĉefredaktoro: Dončo HITROV

Redaktoroj: Haim LEVI (vicĉefredaktoro), Lidia RAEVA (lingva redaktoro), Maria JANKOVA

Redakta komitato: Marin BAĈEV, Mariana ELENOVA, Dimitar HAĜIEV, Krástju KARUCIN, Georgi MIHALKOV, Venelin MITEV, prof. d-ro Kiril POPOV

Teknika arango: Ljubomir LAZAROV

Korektisto: Jordan ĈALJOVSKI

Administranto: Asen JOSIFOV

Revuo „Bulgara Esperantisto“ — fondita en 1919, distingita per ordeno „Kiril kaj Metodij“ — I grado. Eldonkvanto 6500 ekz.

Adreso de la redakcio:

„BULGARA ESPERANTISTO“

Bul. Aristo Botev 97

1303 Sofio, Bulgario

P. K. 66

1 000 Sofio

Ŝtata presejo „Georgi Dimitrov“, bul. Lenin 117

distroj

KIEL ĈASI KROKODILOJN?

Ĉe la albordigejo staris sunbruniginta junulo en altaj botoj, kun grandega pajloĉapelo surkape. El lia gamaŝo elstaris granda larĝa trancilo.

„Interkonatigu“, diris la interpretisto. „Ernando, la ĉasisto de krokodiloj.“

„Pridemandu lin“, mi subite alparolis la interpretiston, „ĉu estas vero, ke lia okupo estas la plej danĝera el la mondo?“

La interpretisto demandis la junulon. Ernando mirigite malfermis la okulojn.

„Li ne komprenas vian demandon“, klarigis la interpretisto. „Li diras, ke la plej danĝeranta okupon en la mondo havas kuracisto. Lia frato laboras en infektarakoj.“

„Do, li diru kiamaniere oni ĉasas krokodilojn.“

Ernando rapide ekparolis. La interpretisto apenau sukcesis tradukadi.

„En la rezervejo ili estas kelkaj personoj. Li diras, ke ili unu post la alia ekiras al la marĉetoj por trovi lokojn, kie krokodilinoj metas ovojn. Antaŭ ol meti la ovojn, la krokodilino fosas kavon, poste kovras ĝin per putrigantaj folioj kaj branĉetoj. Ĉar la foliaro putras, en la kavo estas konstanta varmo. Kiam Ernando trovas tian neston, li elfosas la ovojn, prenas ilin en sian sakon kaj alportas en la rezervejon. Ĉi tie oni metas la krokodilovojn en inkubatoron, kie elovigas el ili krokodilidoj. Oni bredas ilin kaj poste lasas ilin, en baritaj tenejoj, ĉe la maturaj bestoj. La krokodilledo estas tre valora. Pro tio la homoj bredas krokodilojn.“

„Mi opinis, ke oni ĉasas krokodilojn per retoj. Aŭ en maŝkaptiloj. Aŭ helpe de helikoptero“, mi diris embarasite.

„Nenio tia estas bezonata. Plej facile estas ĉasi ilin tiamaniere.“

„Por kio do vi portas la maĉeton?“

„Mi bezonas ĝin por trahaki vojon en la kanaro.“

Esperantigis: J. TOMIŠEK

(Laŭ la libro de la soveta verkisto Svyatoslav Saharov „Elefantoj sur asfalto“)

POPOLAJ RIDETOJ

(el la ukraina revuo „Perec“)

Fraŭlo diras al sia estonta edzino:

— Mi avertas vin, mia amata, ke la familia vivo ne estas sole plezuroj. Kiam ni geedziĝos, vi devos kuiri mangajojn.

— Kaj vi devas mangi ilin.

Oldulino eliras el la kabineto de la doktoro kaj mal-kontente murmuris:

— Nun oni kuracas ne tiel, kiel antaŭe!

— Kaj kia estas la diferenco, avinjo?

— Iam la kuracisto esploris min dum horo kaj skribis tri minutojn kaj, nun ĉio estas inverse.


— Kiam vi havas plej multe da spektantoj? — estis demando al la direktoro de teatro.

— Kiam estas venditaj ĉiuj biletoj.

Esperantigis: E. S. PEREVERTAJLO,
Taŝkento, USSR

ANGULENIGMO

(en ambaŭ direktoj)



A — Dinamo, B — Maŝino por suprenlevi grenon,
C — Ne revoluci, Ĉ — Injektebla anestezilo, D —
Malaltigo de la prezo, E — La ĉefurbo de Grekujo,
F — Lina teksaĵo, G — Orumi, Ĝ — Nomo de la li-
tero R, H — Vokalo.

Aŭtoro: Stano MARCEK, CSSR



Ĉu vi estas observema? Malkovru la sep diferencojn inter ambaŭ desegnaĵoj.